

Kubo:

La mortiga socialismo¹ - senprecedenca memdetruo de bankrota pseŭdokomunisma ŝtato

50 jarojn da fuŝa politiko, falsa ekonomio kaj erara ideologio. Kalejdoskopio de fiaskinta latinamerika eksperimento. Resuma politika raporto pri la pasintaj dudek jaroj 1989-2010 en Kubo.

1989

En 1989 Kubo komencis revoki sian armeon el Angolo. Okaze de vizito de Miĥail Gorbaĉov en Kubo estis subskribita kontrakto pri amikeco kaj kunlaboro kun valideco de 25 jaroj. En Kubo okazis sanga purigo ene de la komunista partio: Pro fraŭdo kaj korupcio estis arestita kaj akuzita la iama generalo pri la kuba armeo en Angolo kaj Etiopio kaj kun li 13 aliaj armeanoj de la ministerio pri internaj aferoj. La generalo (Ochoa) kaj tri aliaj estis kondamnitaj al mortpuno kaj ekzekutitaj en julio 1989, dum ses oficiroj ricevis arestpunon de po 30 jaroj, tri po 25 jaroj kaj unu je 10 jaroj. Lige kun tio okazis personara purigo en la ministerio pri internaj aferoj kaj en la armeo. La iama ministro pri trafiko ricevis punon de 20-jara aresto pro korupcio. Iu alia altrangulo suicidis. En septembro sekvis la iama ministro pri internaj aferoj (Abrantes), kiu estis kondamnita al 20-jara punaresto pro korupcio. Fine de la jaro Fidel Castro reagis al la ŝanĝoj en orienta Eŭropo per publika deklaro, ke Kubo bezonus „iom da tempo“ por adaptiĝi al la novaj cirkonstancoj. Samtempe la komunisma partio estis konfirmita kiel gvida forto en ŝtato kaj socio.

1990

Kubo revokis siajn studentojn el Hungario kaj Ĉeĥoslovakio. Pluraj kubanoj fuĝis en eksterlandajn ambasadejojn por forlasi la landon. Pro la foresto de sovetia nafto en aŭgusto estis ordonita limigita uzado de la brulŝtofo kaj anoncita rigora energi-ŝparado. En somero okazis en Havano la 75a Universala Kongreso de Esperanto kun 1617 partoprenantoj. Fidel Castro persone aperis plurfoje en la kongresejo kaj inter esperantistoj kaj akceptis grandan delegacion (200 personan) de UEA-aktivuloj en la Palaco de la Revolucio, kie li manpremis ĉiun esperantiston unuope kaj kie la ĉeestantoj ĝuis luksan bufedon.

1991

En Kubo formiĝis la opozicia (malpermesita) Demokrata Unuiĝo.

1992

Nova konstitucio akceptiĝis, antaŭvidanta la enkondukon de rektaj parlamentaj elektoj kaj artikolon pri la libereco de la religio. Unuafoje estis publikigitaj ciferoj pri la evoluo de la turismo en Kubo. Laŭ tiuj indikoj en 1992 460'610 eksterlandaj personoj gastis kiel turistoj en Kubo. Tio signifis kreskon de 8,6 procentoj kompare kun 1991 kaj egalas

¹ Aludo al la en Kubo valida slogano „Socialismo aŭ morto“.

al 382,4 milionoj da usonaj dolaroj (USD) da enspezoj (kompare kun 287 milionoj en 1991).

1993

En marto Fidel Castro estis konfirmita kiel estro de la ŝtato kaj registaro. Ekde 1993 la membroj de la Nacia Asembleo (589) unuafoje elektiĝis ‚rekte‘, t.e. pere de komisionoj de la ‚amasaj organizaĵoj‘.

1994

Kubo travivis la plej malfacilan ekonomian krizon depost 1959. Draste reduktiĝis la ĉefa deviza fonto el eksporto de sukero. En septembro la registaro reagis per malseverigo de la ŝtata monopolo sur la agrikultura kampo. Fondiĝis kooperativoj, kiuj povas memstare decidi pri la produktado, kaj neuzataj parceloj povas esti kultivataj far privatuloj. Fine de 1994 la popolkongreso permesis ekonomiajn reformojn, en kiuj la plej signifa inovacio estis la allaso de la privata komerco. Krom tio estis akceptita nova leĝo konsistanta el dek punktoj por solvi la finanĉan krizon; ĝi antaŭvidis pli altajn prezojn, la abolon de la senpagaj servoj kaj la ŝtatajn subvenciojn, la enkondukon de imposto por la enspezoj (3.8.) kaj la novan pritakson de la nacia valuto. Pro la provizora rezigno puni la nelaŭleĝan forlason de la lando, la lavango de kubaj rifuĝintoj al Florido atingis kun pli ol 16'000 homoj novan kulminon (t.n. Balsero-krizo). Usono reagis per la nuligo de la azilrajto por kubanoj, kaj 13'000 rifuĝintoj estis internigitaj en la usona armea bazo de Guantánamo. Por fortigi la premon, Usono malpermesis al la ekzilkubanoj daŭre ĝiri devizojn al Kubo (t.e. 400-500 milionoj USD jare, dum la gajno el sukereksperto en 1993 estis ĉ. 778 miliardoj USD). Laŭ nova interkonsento inter Kubo kaj Usono de la 9a de septembro 1994 Kubo devigis sin eviti la fuĝon de pliaj kubanoj, aliflanke Usono pretis akcepti la kvoton de minimume 20'000 kubanojn jare. Por plibonigi la malbonan ekonomian situacion ekde oktobro la kamparanoj, ŝtataj farmistoj kaj kooperativistoj rajtis vendi siajn produktojn en 130 liberaj merkatejoj, ekde decembro tio validis ankaŭ por industriaj kaj etmetiaj varoj. Komence de novembro Ruslando ĉesigis la liveron de nafto al Kubo, ĉar Kubo ne kapablis plenumi la laŭkontrakte promesitan interŝanĝon pri sukero (2,5 milionoj da tunoj da kruda petrolo kontraŭ 1 miliono da tunoj da sukero). 700'000 eksterlandaj turistoj vizitis Kubon, kio egalas al enspezoj de 800 milionoj da USD, kio korespondis kun ĉ. 15 procentoj de la bruta enlanda produkto de Kubo.

1995

La sukerrikolto ripete komenciĝis malfavore, tiel ke Ruslando retenis la promesitan liveron de 700'000 tunoj da kruda petrolo (la energia provizado de Kubo dependis je 90 procentoj de la nafto). La registaro anoncis, ke eksterlandanoj rajtas partopreni en ĉiuj ekonomiaj sektoroj. Laŭ preciziga kontrakto de la 2a de majo kubanoj, vojaĝantaj nelaŭleĝe al Usono, estis resenditaj. Per tio la aŭtomata garantio de la ekzilo por kubanoj, kiu validis dum jardekoj, finiĝis. Okaze de la pintkonferenco de la Unuiĝo de karibaj ŝtatoj en Port of Spain, Trinidado kaj Tobago, en aŭgusto, kiun Fidel Castro ĉeestis, estis postulita la nuligo de la usona embargo kontraŭ Kubo, sed samtempe ankaŭ la demokratiigo de Kubo. En septembro la kuba parlamento akceptis leĝon, kiu permesis al eksterlandanoj plene posedi entreprenojn, kondiĉe ke la registaro konsentas en la unuopaj kazoj, kaj la gajno povis esti ĝirita al eksterlando. Krom tio la akiro de

grundo estis permesata. Laŭ Fidel Castro ekzilkubanoj ne estis ekskluditaj el tiu leĝo, kiu tamen rikoltis kontraŭstaron en la parlamento. La perpafa faligo de du usonaj civilaj aviadiloj antaŭ la kuba bordo draste malbonigis la rilatojn kun Usono, kiu reagis per malmildigo de la sankcioj. En la sekureca konsilio de UN Kubo rikoltis kritikon pro la atako kontraŭ la usonaj civilaj aviadiloj. Laŭ la nova usona Helms-Burton-leĝo blokiĝis eksterlandaj investoj en Kubo, kaj ankaŭ la vendo de varoj, uzantaj kubajn produktojn (ekzemple sukero), fariĝis malpermesataj. Eŭropa Unio, Kanado kaj la Rio-grupo akre kritikis tiun novan leĝon. La Organizo de Amerikaj Ŝtatoj decidis, ke la leĝo ne kongruas kun la internacia juro. Post tiu lavango de protestoj prezidento Clinton nuligis parton de la leĝo. En 1995 Kubon vizitis 745'000 eksterlandaj turistoj, el kiuj estis gajnitaj unu miliardo USD.

1996

Laŭ gazetara komuniko (FAZ de 19.2.1996) la bruta enlanda produkto de Kubo malkreskis konstante ekde 1990 je po 30 procentoj en la lastaj jaroj. Sole la turismo kreskis kaj alportis al Kubo en 1995 devizojn de 1 miliardo USD, dum el la eksporto de la sukero estis gajnita nur 600 milionoj USD. La averaĝa monata enspezo de la kuba popolo estis 193 pesoj, kiuj egalas al 8 USD, kaj tiel la novaj ŝtataj dolaraj vendejoj restis neatingeblaj por la normalaj homoj. Laŭ iu statistiko 75% de la kubanoj suferis nesufiĉan nutradon. Sen la helpo de la ekzilkubanoj, kiuj laŭ informo de la nacia banko de 1995 ĝiris 574,8 milionojn USD (sen la 600 tunoj da medikamentoj), la situacio estus multe pli malbona. Helpo de eksterlando apenaŭ plu estis atendebla, ĉar Kubo ne pagis la interezojn de siaj ŝuldoj en alteco de 7 miliardoj USD ekde la mezo de la 80aj jaroj. En novembro la plenkunsido de UN kondamnis por la kvina fojo la usonan embargon: 137 ŝtatoj, unuafoje ankaŭ ĉiuj EU-ŝtatoj, voĉdonis por la nuligo de la sankcioj kontraŭ Kubo. En decembro Kubo proklamis la usonan Helms-Burton-leĝon kontraŭ la juro kaj agnoskis la rajton de kubaj civitanoj postuli de Usono perdokompenson pro damaĝoj kaŭzitaĵ de la usona politiko. En novembro eksplodis diplomatia krizo inter Kubo kaj Hispanio, ĉar Havano nuligis la akreditiĝon por la nova hispana ambasadoro kiel protesto kontraŭ la rigora politiko de ĉefministro Aznar. Post 34-jara interrompo Kubo revivigis la diplomatiajn rilatojn kun Haitio, kaj en januaro 1997 la ministro pri eksteraj aferoj de Kanado unuafoje vizitis Kubon (en Kanado akceptiĝis leĝo, kiu protektu la varojn de kanadaj entreprenoj, kiuj estas tuŝitaj de la usona Helms-Burton-leĝo).

1997

En la kuba aparato okazis ŝanĝoj: En februaro estis eksoficigita la kulturministro Dávalos, kiu okupis tiun oficon de 1976, kaj anstataŭita de Jiménez, estro de la nacia Unuiĝo de verkistoj kaj artistoj. En novembro devis demisii ankaŭ la justicministro Fores, kiu estis longa lojalulo de Fidel Castro. En aprilo la EU-ŝtatoj suspendis la arbitracian proceduron, kiun ili anoncis ĉe WTO, kaj kies celo estis ekzameni, ĉu la Helms-Burton-leĝo kontraŭas internaciajn komercajn regulojn. Clinton agnoskis la rajton de usonaj entreprenistoj kaj usonaj civitanoj inkluzive de ekzilkubanoj, kiuj havas la usonan ŝtatanecon, ke ili rajtas per jura plendo postuli perdorekompenson. Daŭre valida restis artikolo IV de la leĝo, kiu antaŭvidas la eblon malpermesi al kubaj gvidantoj kaj al posedantoj de eksterlandaj entreprenoj, kiuj engaĝiĝas en Kubo, inkluzive de ties familianoj, vojaĝi al Usono. Ekzilkubanoj ĝiris monon al Kubo en alteco de 800 milionoj USD. Meze de marto la usona televida stacio CNN malfermis

oficejon en Havano. En aprilo la plenkunsido de UN postulis de Kubo liberigi ĝiajn politikajn arestitojn kaj en novembro ĝi postulis, esprime per la volo de 143 ŝtatoj (krom Usono, Israelo kaj Uzbekio), por la sesa fojo la nuligon de la usona embargo. En julio estis arestitaj en Kubo ne nur kvar membroj de malpermesita, sed tolerata disidenta organizaĵo pro „kontraŭrevolucia agado“, sed ankaŭ diversaj kubaj ĵurnalistoj. La kvina konferenco de la kuba komunista partio en oktobro konfirmis la validan politikon kaj ekonomian sistemon kaj Fidel Castro defendis la reformojn, kiujn li anoncis. Ĉe 11 bombaj atencoj kontraŭ turismaj instalaĵoj de Kubo kaj efektivigitaj dise dum la jaro pereis unu italo kaj vundiĝis ses aliaj homoj. Post kiam oni malkovris la tombon de Che (Ĉe) Guevara en Bolivio, liaj restaĵoj estis transdonitaj al Kubo, kie en oktobro oni entombigis lin en la maŭzoleo en Santa Clara kun ĉiuj ŝtataj honoroj. En novembro okazis la 7a Ibero-Amerika pintkonferenco, kie Fidel Castro rifuzis politikajn reformojn. En novembro ankaŭ forpasis en Miami la plej grava gvidanto de la ekzilkubanoj, Jorge Mas Canosa, kiu en 1981 fondis la Kuban Amerikan Nacian Fondaĵon (CANF). La kristnaska mesaĝo de la papo aperis sur la unua paĝo de la partia ĉefgazeto *Granma*, sekve Kristnasko denove povis esti festata, post kiam ĝi estis abolita en 1969. Kubo eksportis lignon (34,3%), vestaĵojn (20,8%), kurenton (18%), kafon (14,3%), agrikulturajn produktojn (2,5) ĉefe al Vjetnamio (42,7%), Tajlando (22,1%), Francio, Belgio, Germanio, Grandbritio, Usono (2,2%), Japanio. En 1997 estis registritaj 1,2 milionoj da turistoj kun sume 1,5 miliardoj USD da enspezoj, dum la ekzilkubanoj ĝiris monon en alteco de 800 milionoj USD.

1998

En januaro papo Johano Paŭlo II. vizitis Kubon kaj renkontiĝis kun Fidel Castro. La ĉefepiskopo Ortega rajtis disaŭdigi televidan mesaĝon, en kiu li postulis, ke Kubo malfermiĝu vidalvide de la mondo kaj ke la mondo malfermiĝu vidalvide de Kubo. Samtempe li kritikis la ateisman edukistemon de Kubo, la malrespekton de la homaj rajtoj kaj la permeson de la abortigo, la neoliberalismon kaj la usonan embargon. Krom tio li postulis la liberigon de la politikaj arestitoj. Publikan diservon partoprenis pli ol centmil personoj, inter ili Fidel Castro mem. Okaze de la januaraj elektoj al la nacia asembleo kandidatiĝis ekzakte tiom da kandidatoj kiel laŭnombre mandatoj estas distribueblaj. En februaro Fidel Castro estis por la kvina fojo konfirmita kiel estro de la ŝtato kaj registaro. En februaro la kuba registaro anoncis la liberigon de 300 arestitoj, inter ili 100 politikaj, sed „kontraŭrevoluciuloj“ devis resti en la prizono. En marto prezidento Clinton anoncis la nuligon de kelkaj sankcioj, kiuj antaŭ du jaroj estis esprimitaj kontraŭ Kubo. Pro humanecaj kialoj Vaŝingtono denove permesis direktajn flugojn kaj monĝirojn al Kubo. En aprilo ne nur la kanada ĉefministro Chrétien vizitis Kubon, sed ankaŭ la homrajta komisiono de UN en Ĝenevo rifuzis usonan rezolucion, kiu celis kondamni Kubon. La speciala raportisto de UN por Kubo, Gröth, konstatis progreson en la traktado de arestitoj en Kubo. En julio Castro kulpigis Usonon, ke ĝi estis involvita en planita murdatenco kontraŭ li, kaj iama soldato el Salvadoro estas akuzita, ke li volis realigi la atencon laŭ ordono de ekzilkubanoj. En oktobro la plenkunsido de UN kondamnis por la sepa fojo ekde 1992 la embargon de Usono, kiu ekzistas ekde 1962 kontraŭ Kubo; 175 ŝtatoj voĉdonis, pli multaj ol antaŭe, por la nuligo de la sankcioj, dum Usono kaj Israelo voĉdonis kontraŭ la nuligo. Pro la ekstrema sekeco en somero, Fidel Castro petis Unuiĝintajn Naciojn sendi nutraĵojn. En 1998 Kubo importis 25% nafton, 13% kemiajn produktojn, 10% nutraĵojn, 6%

maŝinojn, 5% krudmaterialojn; la landoj estis Hispanio (22%), Francio (11%), Kanado (10%), Italio (8%), PR Ĉinio (6%), Venezuelo kaj Ruslando /po 5%), Argentino (3%). Kubo eksportis ĉefe sukerojn (42%), nikelon (18%), tabakon (13%) kaj fiŝaĵojn (9%) unuavice al Hispanio (14%), Ruslando (12%) kaj Meksikio (9%), laŭ alia fonto (eble por 1997) al Tajlando, Vjetnamio, Singapuro, Japanio, PR Ĉinio. La grava ekonomia krizo pliseverigis en 1998, la malriĉeco de la popolo kreskadis kaj la sansistemo troviĝis en priplorinda situacio. Pro malbona vetero kaj sekeco, sed ankaŭ pro la malaltaj prezoj en la monda merkato, la rikolto de sukerkano estis la plej malbona ekde jardekoj. La enlanda bruta produkto kreskis laŭ oficialaj indikoj nur 1,2 % (en 1997: 2,5%), sed laŭ CEPAL la bruta socia produkto kreskis en 1999 je 6%. La ĉefa neta deviza fonto estis laŭ CEPAL la ĝiroj de ekzilkubanoj en supozata alteco de 800-900 USD jare. La ĉefa enspezofonto de la lando estis la turismo, kiu alportis en 1999 1,9 miliardojn USD. La nombro de turistoj kreskis en la pasintaj dek jaroj de 320'000 al 1,6 milionoj. Sed duono de la produktoj por turistoj devas esti importita.

1999

Per pli severaj leĝoj kaj pli forta polica kontrolo la kuba registaro klopodis limigi la kontakton de kuboanoj kun eksterlandanoj. La kondamno de kvar disidentoj sekvigis frostiĝon de la klimato inter Kubo unuflanke kaj Kanado kaj la EU-ŝtatoj, precipe Hispanio, aliflanke. En februaro la nacia parlamento akceptis la leĝon pri protekto de la nacia sendependeco kaj la ekonomio de Kubo, kiu celis precipe disidentojn kaj ĵurnalistojn. Se eblis difini agadon celantan damaĝi la ŝtaton aŭ kiu servas usonajn interesojn, la punito povis ricevi ĝis 30 jaroj (anstataŭ ĝis nun 20) da punaresto en malliberejo. La katalogo de la puneblaj deliktoj, kiuj estas klasifikeblaj kiel „kontraŭrevoluciaj“, estis larĝigita. Fone de la kreskanta krimo kaj prostitucio estis akceptitaj de la parlamento pli severaj novaj leĝoj, kiuj antaŭvidis i.a. la enkondukon de la mortpuno pro posedo, produktado kaj komercado per drogoj. Prostitucioj, kiuj varbas turistojn, estis minacataj de perforta edukado en agrikultura koncentrejo, kaj ĉe ripeto de sia krimo povis ricevi 20 jarojn da punaresto en malliberejo. Iu juĝejo en Havano kondamnis en marto kvar gvidajn reĝimkritikistojn, inter ili Vladimiro Roca, pro inico de ribelo, je 3,5-5 jaroj da malliberigo. Ĉi tiuj kvar akuzitoj, membroj de la neleĝa, sed parte tolerata „Laborgrupo de la interna disidenteco“, estis arestitaj en julio 1997 pro la disvastigo de kontraŭŝtata verkaĵo kaj pro alvoko al bojkoto de balotoj. La jura proceduro, kiu komence de marto 1999 efektiviĝis nepublike, kaŭzis en eksterlando ondon de akraj protestoj, precipe en Usono, Kanado kaj Eŭropa Unio. Antaŭ tiu proceso estis dume arestitaj ĉirkaŭ 100 opoziciuloj kaj ĵurnalistoj. En marto iu juĝejo kondamnis en Havano la civitanon de Salvadoro, Raúl Ernesto Cruz León, je la mortpuno. Oni riproĉis al li, ke en somero 1997 li lanĉis bombatencojn kontraŭ hoteloj kaj restoracioj en Havano laŭ mendo de ekzilkubanoj; la akuzito konfesis la atencojn. En majo nova ministro pri eksterlandaj aferoj de Kubo fariĝis Felipe Pérez Roque, membro de la ŝtata konsilio kaj intima kunlaboranto de Fidel Castro. La gazeto *Granma* pravigis la ŝanĝon per la neceso de „pli rigora, profunda, sistema kaj ambicia“ ekstera politiko. Bill Clinton anoncis en januaro la duan malmildigon de la sankcioj ene de dek monatoj. Oni antaŭvidis rektan poŝtan trafikon, pli da Ĉarter-flugoj kaj la eblon de monĝiroj de ĝis maks. 1200 USD al Kubo jare de ĉiu, kiu rezidas en Usono (ĝis nun tio eblis nur por ekzilkubanoj al ties parencoj). La kuba popolkongreso postulis de Usono pagon de perdokompensaĵo kun la argumento, ke Usono praktikas ekde 1959 genocidon kontraŭ

la kubanoj. En rezolucio estis listigitaj la sekvoj de la embargo de 1962 kontraŭ Kubo. La registaro deponis plendon ĉe la provinca juĝejo de Havano rilate al postulo pri pago de perdokompensaĵo en alteco de 181 miliardoj USD; la juĝejo kondamnis Usonon ĝin pagi. Laŭ *Granma* per tiu sumo devus esti rekompensitaj la malamikaj aktivecoj de Usono kontraŭ Kubo ekde 1959, dum kiuj 3478 kubanoj estis mortigitaj. Nova krizo ŝarĝis la rilatojn inter Kubo kaj Usono pro la boata rifuĝinto Elian González, kiu kaptiĝis en la maro antaŭ Florido. En novembro okazis la 9a Ibero-amerika pintkonferenco de la ŝtatsprezidentoj de Latinameriko kaj de Hispanio kaj Portugalio unuafoje en Havano. En 1999 Kubo importis varojn ĉefe el Japanio (12,8%), Usono (12,3%), Germanio (7,7%), Saŭdarabio (6,2%), Italio (5,8%), Grandbritio (5,7%). La insulon vizitis 1,6 milionoj da eksterlandaj turistoj, kio egalas al enspezoj de 1,9 miliardoj USD.

2000

En oktobro 2000 la usona Domo de Rerezentantoj kaj poste la Senato decidis mildigi la komercan embargon kontraŭ Kubo, kiu ekzistas ekde 1962. Sekve al tio devus esti permesata ekde 2001 la vendo de usonaj produktoj (nutraĵoj) kaj medikamentoj. Sed la usona registaro aŭ usonaj bankoj ne rajtis doni kreditojn al Kubo. Usonaj civitanoj daŭre bezonis specialan permeson por vojaĝi al la insulo. En septembro Castro kaj Lukaŝenko, prezidento de Belorusio, subskribis en Havano kontrakton pri kunlaboro sur la kampoj de la lukto kontraŭ la krimeco, droga kaj armila kontrabando kaj internacia terorismo kaj por reguligi la komercajn rilatojn inter ambaŭ landoj. En decembro laŭ invito de Castro la ruslanda prezidento Putin restadis en Kubo. En la centro de la diskutoj troviĝis la armea kooperado antaŭvidanta rusajn armilajn liverojn, la konstruadon de rustipa nuklea centralo kaj la intensivigon de la ambaŭflankaj komercaj rilatoj. Rilate la kubajn ŝuldojn en alteco de 20 miliardoj USD oni ne trovis solvon. En decembro Kubo kaj Ĉinio subskribis interkonsenton cele al la plifortigo de la armeoj de ambaŭ landoj. Dum la 10a Ibero-amerika pintkonferenco en Panamo-Urbo en novembro okazis ĉagreno kun Panamo kaj Salvadoro: Oni arestis la ekzilkubanon Luis Posada Carriles, post kiam Castro kulpigis la salvadoran prezidenton, Francisco Flores, ke tiu subtenis murdatencon, kiun kuba ekzilgrupo el Miami sub la gvido de tiu Carriles planis kontraŭ li. Kadre de la unua vizito de Castro deponit 40 jaroj en Venezuelo, kie en 1999 ekregis la internacie kontestata bolivaristo kaj Bush-kritikisto Hugo Rafael Chávez Frías, estis decidite inkluzivi Kubon en la nafta kontrakto ekzistanta inter pluraj centramerikaj kaj karibaj ŝtatoj kaj Venezuelo. Oficiale la senlaboreco estis en Kubo 5,7% kaj la inflacio – 3,0%. En 2000 alvenis al Kubo 1,8 milionoj da eksterlandaj turistoj, en 1999 la gajno el la kuba turismo estis 1,714 miliardoj USD.

2001

Novaj perturboj okazis en januaro lige kun la aresto de du ĉeĥaj civitanoj en Kubo – Ivan Filip (eksa financministro) kaj Jan Bubenik (iama studenta gvidanto). La kubaj instancoj asertis, ke ili kontaktis kubajn disidentojn. La du ĉeĥoj liberiĝis nur en februaro. Misagordo eksplodis samtempe ankaŭ inter Kubo kaj Argentino post kiam Castro kritikis la argentinan ekonomion kaj la rilaton de Argentino vidalvide de Usono, kiu estis laŭ li tro lojala. Sekve el tio Argentino revokis dume sian ambasadoron el Havano. Krom tio Castro plendis pri tio, ke Argentino subskribis UN-rezolucion, kiu kondamnis la homrajtan situacion en Kubo. En aprilo la homrajta komisiono de UN en

Ĝenevo kondamnis Kubon pro daŭra politika subpremado. La rezolucio lanĉita de Ĉeĥa Respubliko estis aprobita per 22:20 voĉoj kun 10 sindetenoj. Same en aprilo estis plifortigitaj la rilatoj inter Kubo kaj Ĉinio pere de subskribo de ok kontraktoj. Post la detrua efiko de la hurikano ‚Michelle‘ en novembro Usono unuafoje liveris al Kubo nutraĵojn. Intertempe, dum sia ĝenerala kunsido UN kondamnis la usonan ekonomian bojkoton per 167:3 voĉoj por la deka fojo. La rusa prezidento Putin anoncis, ke Ruslando fermos la centralon pri spionado kaj defendo ‚Lourdes‘ apud Havano, kiu ekfunkciis en 1964. De tiu centralo la amerika kontinento povis esti prispionata. La fermo de la punkto signifis por Kubo jaran perdon de 200 milionoj USD pro forfalo de ludonaj enspezoj.

2002

Okaze de la 58a Kunsido de la homrajta komisiono de UN okazinta en aprilo en Ĝenevo ne nur vico de eŭropaj ŝtatoj kondamnis Kubon pro daŭra politika subpremado, sed ankaŭ aro da latinamerikaj ŝtatoj aliĝis sub la gvido de Urugvajo al rezolucio pri la situacio de la homaj rajtoj sur la kariba insulo. La teksto, aprezanta iujn kubajn atingojn en sociaj demandoj malgraŭ malfacilaj kondiĉoj, postulis la respekton de la civitanaj kaj politikaj rajtoj en akordo kun la internaciaj normoj. Sekve okazis misagordo inter Kubo kaj EU, kaj Urugvajo portempe retiris sian ambasadoron el Havano, ĉar la kuba ministro pri eksterlandaj aferoj taksis la urugvajan iniciaton kiel komplezon al Usono. Konfida krizo eksplodis ankaŭ kun Meksiko, kiu subtenis la latinamerikan rezolucion kaj kompare kun pli fruaj tempoj transiris al multe pli severa sinteno vidalvide de Kubo. En majo disidentoj submetis al la kuba parlamento peticion, kiun subskribis 11'020 personoj. Ĉi tiu ‚projekto Varela‘ postulis la respekton de bazaj politikaj kaj ekonomiaj rajtoj, reference al la artikolo 88 de la kuba konstitucio, kiu antaŭvidas tiajn iniciatojn. La projekto, kiu estis prisilentigita de la kuba gazetaro, atingis tamen sufiĉe vastan atenton en la eksterlandaj amaskomunikiloj. La peticio estis transdonita du tagojn antaŭ la alveno de Jimmy Carter, eksprezidanto de Usono, kiu vizitis Kubon laŭ invito de Castro. En parolado antaŭ studentoj kaj profesoroj de la havana universitato, kiu estis sencenzure disaŭdigita en la ŝtata televido, Carter laŭde menciis la projekton Varela kaj esprimiĝis samtempe favore al la nuligo de la ekonomia embargo. En junio okazis kolekto de subskriboj favore al la senŝanĝa ankro de la socialismo en la konstitucio. En popola enketo realigita en julio, 98,9% de la voĉdonrajta loĝantaro pledis por nerevokebla ankro de la ekzistanta ekonomia kaj politika sistemo en la konstitucio. La subskribkolekton antaŭis amasaj manifestacioj kontraŭ la usona Kubo-politiko. Okaze de la centa datreveno de la sendependeco de Kubo la 20an de majo 2002 prezidento Bush diris, ke la nuligo de la embargo dependas de la okazigo de liberaj elektoj kaj demokratiaj reformoj.

2003

Post la parlamentaj elektoj en januaro, du monatojn poste la parlamentanoj elektis por la sesa fojo la 77-jaran Fidel Castro por pliaj kvin jaroj kiel prezidanton de la ŝtata konsilio kaj per tio kiel prezidenton de la ŝtato kaj kiel estron de la registaro. En marto la registaro arestigis 78 disidentojn kaj sendependajn ĵurnalistojn, al kiuj estis rproĉitaj, ke ili estas envolvitaj en konspiraj aktivecoj helpe de Usono. La duono de la arestitoj partoprenis la ‚projekton Varela‘. En akcelita jura proceso la arestitoj estis kondamnitaj al malliberigo inter 12 kaj 27 jaroj. En tio la juĝejo apogis sin unuafoje je la leĝo pri

defendo de la nacia sendependeco kaj ekonomio, kiu estis alprenita en 1999. Inter la kidnapistoj de kuba pasaĝera ŝipo, kvar ricevis punon de dumviva malliberigo, dum tri aliaj ricevis la mortpunon pro „gravaj terorismaj agadoj“ – la mortpuno estis efektivigita. Mondvaste la juĝoj kaŭzis akrajn protestojn kontraŭ la fino de la mortpuna moratorio. Post sankcioj anoncigitaj flanke de EU, la kuba registaro reagis ĉagrenite kaj mobilizis centmilojn da civitanoj por utiligi ilin en amasaj manifestacioj kontraŭ EU. Okaze de la 50a datreveno de la atako kontraŭ la Moncada-kazerno Castro glorigis antaŭ dek mil invitataj gastoj la atingojn de la revolucio; samtempe li rifuzis la dialogon kun EU kaj proklamis, ke Kubo malakceptos ĉian helpon el Bruselo. La ekonomia situacio estis tre malfacila, kaj merkatekonomie orientitaj iniciatoj estis haltigitaj, tiel ke eksterlandaj investoroj seniluziiĝis. En julio la kuba registaro malpermesis al firmaoj, kiuj troviĝas en ŝtata posedo, utiligi la usonan dolaron kiel pagilon. Paralele al la ‚projekto Varela‘, en septembro unuiĝo de kubaj opoziciaj grupoj submetis en Havano katalogon kun postuloj pri pli da civitanaj kaj ekonomiaj rajtoj. En oktobro Oswaldo Payá, la koordinanto de la projekto, transdonis al la parlamento duafoje pli ol 14'000 subskribojn. Konfuzon kaŭzis la klarigo de la kuba sekreta servo, ke centraj figuroj de la opozicio sekrete laboris por la registaro: konkrete oni asertis, ke la fama disidentulo kaj prezidanto de la kuba homrajta organizo, Elizardo Sánchez, estis mem agente de la registaro. Sánchez kontestis la riproĉon. Krome, la opozicio konfuziĝis kiam Néstor Baguer, la prezidanto de la Sendependa Ĵurnalista Unuiĝo de Kubo, malkovris sin mem dum la juraj procesoj en printempo 2003 kiel ĉefan atestanton de la akuzo.

2004

Laŭ indikoj de kubaj homrajtaj asocioj, 316 personoj troviĝis en malliberejo pro politikaj kialoj, dum Amnestio Internacia parolis pri 88 politikaj prizonanoj. En aprilo estis lanĉita la tria tutlanda kolektado de subskriboj de Oswaldo Payá. En la sama monato la homrajta komisiono de UN en Ĝenevo akceptis novan rezolucion kontraŭ Kubo pro malrespekto de la bazaj homaj rajtoj kaj postulis delegi UN-observanton al la lando. Samtempe la kuba reprezentanto en Ĝenevo kulpigis Usonon, ke ĝi premis la membroŝtatojn de la komisiono, kaj Havano sendis rezolucion proponon al la homrajta komisiono de UN en Ĝenevo, en kiu la kuba flanko postulis esplori la arestokondiĉojn en la usona prizono de Guantánamo. Sed iom poste Kubo retiris la proponon por malriski voĉdonan fiaskon. Same kiel en antaŭaj jaroj, la rezolucio, ĉefapogita de Honduro, kaŭzis diplomatajn tensiojn inter Kubo kaj kelkaj latinamerikaj ŝtatoj, kiuj apogis ĝin. En majo Meksiko retiris sian ambasadoron el Kubo kaj alvokis la kuban kolegon en Meksikurbo senprokraste forlasi la landon, post kiam Castro riproĉis al Meksiko, ke ĝi konformis al la deziroj de Usono. Ankaŭ Peruo reagis same al simila retorika atako de Castro kontraŭ la perua prezidento per retiro de sia ambasadoro el Havano. Post renkontiĝo inter la ministroj pri eksterlandaj aferoj de Kubo kaj Meksiko la situacio dume senŝtreĉiĝis. En majo la usona registaro akceptis la rekomendaron de registara komisiono, kiu antaŭvidis malmildigon de la sankcioj kontraŭ Kubo por akceli la finon de la komunisma regado. La plano antaŭvidis la limigon de vizitoj, pli fortan kontrolon de la devizaj ĝiroj de akzilkubanoj kaj pli senteban informan kampanjon kontraŭ la lando. La plano kaŭzis konsternon ĉe la registaro kaj popolo de Kubo – unu miliono da homoj manifestaciis kontraŭ Usono. Reage al la usonaj sankcioj la kuba registaro anoncis eksterordinarajn rimedojn, inter alie la altigon de la prezoj por benzino kaj limigis por kubanoj enlande la eblecon aĉeti varojn per dolaroj. En junio/julio tri

famaj disidentoj estis liberigitaj. Ekonomie Kubo revenis al pli planekonomiaj modeloj. En oktobro la usona dolaro estis abolita kiel valida pagrimedo apud la peso, kaj la popolo havis la okazon ŝanĝi siajn dolarojn en konverteblajn pesojn (cuc), kun deviga imposto de 10% ĉe la monŝanĝo. Krom tio ĉiuj devizaj enspezoj kaj elspezoj devis esti efektivigitaj tra unusole valida konto ĉe la centra banko. Ĉi tiuj paŝoj okazis en ekonomie relative dinamika periodo, despli ke al ĝi iom kontribuis diversaj ekonomikoooperaj kontraktoj kun Ĉinio kaj Venezuelo. Krom tio, oriente de Havano en la maro estis malkovritaj novaj naftaj kampoj. Oficiale la inflacio estis en Kubo 3%, neoficiale 6,5%.

2005

Ĝis januaro 2005 la kubaj instancoj liberigis 14 de la en 2003 arestitaj 78 reĝimkritikantoj, inter alie Raúl Rivero, kiu ricevis la permeson forveturi al Hispanio. Tiel fine de januaro 2005 EU nuligis la limigon de la diplomaciaj rilatoj, postulante la senkondiĉan liberigon de ĉiuj politikaj arestitoj kaj pliajn koncedojn al la opozicio. Laŭ indiko de Amnestio Internacia en marto 2005 troviĝis daŭre minimume 71 personoj en malliberejo pro politikaj kaŭzoj. En aprilo Kubo rifuzis plian rezolucion de la homrajta komisiono de UN en Ĝenevo, kiu antaŭvidis UN-mision en Kubo kun la celo esplori la malrespektojn de la homaj rajtoj, kiuj estas riproĉitaj al la kuba registaro. La kreskanta izoligo de la lando devigis la registaron de Kubo iom mildigi la duran kurson kontraŭ kritikantoj de la reĝimo. Pro la malmildiganta sinteno de la usona registaro, Castro serĉis realproksimiĝon al EU, kiu praktike glaciigis siajn rilatojn kun Havano post la aresta ondo en marto 2003. Kiel protagonisto por la realproksimiĝo funkciis Hispanio. Ankaŭ kun Hungario la diplomaciaj rilatoj estis fine de 2004 unuflanke restarigitaj. Okaze de la dua jara datreveno de la amasa arestado de disidentoj en 2003 ĉirkaŭ 30 edzinoj de arestitoj protestis antaŭ la centralo de la ŝtata ĵurnalista sindikato. Ŝajne tute surprize Castro toleris la konferencon de 150 reprezentantoj de diversaj kubaj disidentaj grupoj, kiu okazis en majo en Havano. Kunvenis plejparte reprezentantoj de radikalaj opoziciaj grupoj, kiuj konsentas pri la ekonomia embargo de Usono, dum pli ol deko da malpli radikalaj organizoj rifuzis sian partoprenon, ekzemple la (kristandemokrata) movado de Oswaldo Payá. Tiu ĉi supozis, ke la registaro toleris tiun de ekzilkubanoj kunfinancitan kunvenon por timigi la publikon pri la disidenta movado. Al la kunveno estis invitetaj politikistoj kaj intelektuloj el la tuta mondo, sed la kubaj instancoj rifuzis ilian eniron en Kubon. La 13an de julio post publika paca protesto lige kun iu datreveno estis arestitaj la sekvaj personoj: Emilio Leyva Pérez, Lázaro Alonso Román, Manuel Pérez Soria, René Montes de Oca Martija kaj Roberto de Jesús Guerra Pérez. Sojle de la datreveno de la komenco de la kuba revolucio estis kadre de du malgrandaj protestagadoj en julio arestitaj entute 57 personoj, inter ili la vicprezidanto de la kuba komisiono pri homaj rajtoj kaj nacia interpaciĝo, Manuel López Bañobre, kiu estis liberigita el la prizono en pasinta novembro, kaj Martha Beatriz Roque, alia opozicia gvidantino. La plimulto de la arestitoj estis denove liberigita en la sekvaj tagoj. Laŭ sstimulo de Castro, en oktobro junularo kaj studentaro okupis benzinejojn, al kies posedantoj oni riproĉis korupton. Sekvis lavango de rimedoj por eviti ŝteladon de ŝtata posedaĵo kaj nigran komercon. En novembro la plenkunveno de UN en Novjorko kondamnis por la 14a fojo la usonan embargon kontraŭ Kubo kaj la embargon kontraŭ ŝtatoj, kiuj komercas kun Kubo. Okaze de la vizito de la prezidento de Panamo en Kubo, Torrijos, estis restarigitaj la diplomaciaj rilatoj inter la du ŝtatoj. Hugo Chávez,

prezidento de Venezuelo, vizitis Kubon en aŭgusto por la kvara fojo. Serio de hurikanoj grandparte damaĝis la sukeran industrion de Kubo. Turisme Kubo registris 2,261 milionojn da internaciaj alvenoj kaj enspezojn en alteco de 1,920 miliardoj USD.

2006

Post alvoko de Castro, en januaro protestis en Havano centmil homoj kontraŭ la Kubo-politiko de Usono. Komence de februaro estis liberigita la disidento Rene Gómez Manzano, kiu estis kondamnita al 25-jara punaresto, dum samtempe kvin aliaj disidentoj estis malliberigitaj. Unuafoje en la historio de la komunista partio de Kubo estis kun Carlos Robinson arestita membro de la politburoo, al kiu oni riproĉis misuzon de la ofico kaj personan riĉiĝon kaj kiun oni kondamnis je 12 jaroj da punaresto. En marto protestis denove edzinoj, patrinoj kaj filinoj de ankoraŭ 60 arestitoj el la jaro 2003, postulante ilian liberigon. Laŭ indiko de la Komisiono pri homaj rajtoj kaj nacia interpaciĝo troviĝis en Kubo aktuale 333 homoj en prizonoj pro politikaj kaŭzoj. Streĉitaj restis la diplomaciaj rilatoj kun Ĉeĥa Respubliko. En aprilo Kubo ordonis al la ĉeĥa ambasadoro forlasi la landon sen pravigi la kialon. Prago reagis per la konservado de sia kritiko kaj premo rilate la homrajtan politikon de Castro. La intensado de la rilatoj kun Venezuelo estis daŭrigita. La kerno de la ekonomia kooperado estis ne nur la kreo de bastiono kontraŭ la politika kaj ekonomia domineco de Usono en la regiono, sed ankaŭ la livero de tage 90'000 bareloj de prezreduktita venezuela nafto. Inverse Havano sendis 20'000 kuracistojn kaj medicinajn fakulojn al Venezuelo. Meze de 2006 Fidel Castro suferis sangofluon en la intestoj, tiel ke necesis komplika operacio, kiu enkondukis lian iompostioman retiriĝon el la aktiva politiko. Fine de julio li provizore cedis la ŝtatajn kaj registarajn taskojn al sia frato Raúl Castro Ruz (*1931). La usona prezidento G. Bush alvokis la kubanojn engaĝiĝi por la demokratia transiro en Kubo. Okaze de la 14a pintkonferenco de la senblokaj ŝtatoj en Havano en septembro Raúl Castro rifuzis la dialogan oferton de Usono, kiu postulis liberajn elektojn kaj la liberigon de ĉiuj politikaj arestitoj. Al Havano ‚pilgrimis‘ 3000 reprezentantoj el 116 landoj, inter ili 50 ŝtatestroj, ekzemple la prezidentoj de Venezuelo, Pakistano, Irano, Sirio kaj Sudafriko. La eksplicite ignorita datreveno de la teroratencoj kontraŭ Usono de la 11.9.2001 dum tiu konferenco provokis la proteston de Ileana Ros-Lehtinen, kiu estis kub-devena respublikana delegito de la usona kongreso; ŝi riproĉis al la kuba reĝimo, ke oni intence elektis tiun daton por misuzi ĝin por montri sian malamikecon kontraŭ Usono. En novembro estis arestita la konata disidento Héctor Palacios. En decembro tamen Kubon vizitis ĝis nun plej granda delegacio de la US-kongreso konsistanta el 6 demokratoj kaj 4 respublikanoj, kun la celo mildigi la sankciojn kaj plibonigi la dialogon. Renkontiĝo kun Raúl Castro ne okazis. En 2006 estis registritaj 2,150 milionoj da internaciaj alvenoj sur la insulon. El la turismo rikoltiĝis 2,404 miliardoj USD.

2007

En februaro tri eksterlandaj ĵurnalistoj devis forlasi Kubon. En aprilo la kuba registaro protestis kontraŭ la liberigo el la prizono de la ekzilkubano Posada Carriles, kiu estis en Usono arestita en majo 2005 pri nelaŭleĝa envojaĝo en Usonon. Kubo postulis la resendon de Carriles, iama CIA-agento, kiu estis akuzita de Kubo, ĉar li planis murdatencon kontraŭ Fidel Castro kaj pro tio estis kondamnita sed amnestiita en Panamo en la jaro 2000. Estis liberigita post 17-jara punaresto la pordemokratia

aktivulo Jorge Luis García Pérez (konata kiel Antúnez), same estis liberigitaj Lázaro Alonso Román kaj Manuel Pérez Soria, sed Rolando Jiménez Posada estis post kvarjara aresto sen jura procezo kondamnita al 12-jara punaresto, ankaŭ la ĵurnalisto Oscar Sánchez Madan estis en sekreta procezo kondamnita al plurjara punaresto. René Montes de Oca Martija kaj Roberto de Jesús Guerra Pérez restis enprizonitaj. En novembro kaj decembro estis arestitaj minimume 47 opoziciuloj, inter ili 15 en iu preĝejo en Santiago de Cuba. En decembro Kubo ellandigis ok hispaninojn, kiuj manifestaciis favore al la liberigo de politikaj arestitoj. En septembro Kubo kaj Hispanio revivigis sian kunlaboron pere de la subskribo de koopera kontrakto. En 2007 oficiale laboris en Kubo 5,232 milionoj da personoj. Inter la eksportaĵoj troviĝis nur po 6% da tabako kaj sukero. La kuba ekonomio konsiderinde kreskis lastatempe ĉefe pro la kontribuo de Venezuelo, kiu liveris nafton kaj aliajn gravajn varojn. Rekompence cent mil venezuelanoj rajtis senpage feriadati en Kubo. Ekonomia kresko en ciferoj (estimo): 1997: 2,5%; 1998: 1,2%; 1999: 6,3%; 2000: 6,1%; 2001: 3,0%; 2002: 1,5%; 2003: 2,9%, 2004: 5,4%, 2005: 11,8%, 2006: 10,0%.

2008

En januaro la 8,4 milionoj balotantoj estis alvokitaj konfirmi la 614 deputitojn de la centra nacia asembleo kaj la 1201 membrojn de la provincaj organoj. Reelektitaj estis ankaŭ Raúl Castro Ruz kaj Fidel Castro Ruz. La partoprenkvoto en la senalternativaj balotoj estis oficiale 96,89%. La 18an de februaro la partia gazeto *Granma* anoncis, ke Fidel Castro ne plu revenos al la pinto de la ŝtato. Per la elekto de Raúl Castro Ruz la 24an de februaro far la inaŭgura kunsido de la nova nacia parlamento kiel nova estro de la ŝtata konsilio kaj kiel ĉefkomandanto de la armeo konkludiĝis la transiro de la povo de unu frato al la alia. En marto la nova registaro anoncis aron da novaj malgrandaj reformoj kiel la permeson uzi moveblajn telefonojn, kio ĝis nun estis privilegio nur por altranguloj, la malfermon de la turismaj hoteloj por la popolo kaj la nuligo de la vendomalpermeso por komputiloj. Krom tio parte liberaliĝis la merkato por laboraj instrumentoj, semaĵoj kaj sterkaĵoj por la kamparanoj. Krome oni komencis altigi la ŝtate fiksitajn prezojn por agrikulturaj produktoj. En aprilo sekvis la anonco, laŭ kiu kubanoj rajtas ekposedi loĝejojn kaj domojn, en kiuj ili mem loĝas. Kritikante la ĝisnunan sistemon de samaj salajroj por ĉiuj, la registaro intencis enkonduki en ŝtataj entreprenoj novan strukturon, laŭ kiu la laboro estos rekompencita laŭ la rezultoj. Per tiuj rimedoj oni esperis plibonigi la ekonomian situacion. Fakte, ekonomie la insulo travivis unu el la plej krizaj jaroj de post la fino de la Frida Milito. Pro malefika ekonomiado kaj naturkatastrofoj Kubo devis importi agrikulturajn produktojn en valoro de 2 miliardoj USD. 84% de ĉiuj nutraĵoj devenis de eksterlando. La disfalo de la valoro de la nikelo, kiu estis la ĉefa eksporta varo de Kubo, kaj la ioma reduktiĝo de la turismo sekve al la monda ekonomia krizo drastigis la situacion. En julio estis publikigita nova leĝo, laŭ kiu privataj kamparanoj rajtas lupreni de la ŝtato ĝis 13 hektarojn da nekultivita tero (proksimume la duono de la potencie kultivebla surfaco ne aŭ nesufiĉe estas utiligataj en Kubo). Fine de decembro ekvalidis pakaĵo de ŝpardevidoj por bridi la krizon. Krom reformo por ministerioj, kie diversaj ŝparoj estu entreprenitaj, ekzemple ĉe eksterlandaj vojaĝoj kaj salajroj, la pensia aĝo estis altigita je 5 jaroj kaj la minimuma dumviva labortempo altigita al 30 jaroj. En februaro la kuba ministro pri eksterlandaj aferoj subskribis en Novjorko la UN-konvencion pri civitanaj kaj politikaj

rajtoj kaj pri ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj rajtoj, kiel parton de la UN-deklaracio pri homaj rajtoj. Tiuj rajtoj antaŭvidas la liberecon de la opinio, renkontiĝo, unuiĝo kaj vojaĝado. Per tiu subskribo Kubo akceptis la kontroladon de la situacio de la homaj rajtoj en la lando fare de la komisiono de la homrajta konsilio de UN. Kubo apartenis al tiuj landoj, kiuj havas la plej altan nombron de politikaj arestitoj laŭ la nombro de la enloĝantaro. Laŭ la Kuba Komisiono pri Homaj Rajtoj en 2008 ekzistis en Kubo 283 politikaj arestitoj. Post la vizito de la EU-komisaro Louis Michel en Kubo en marto la ministroj pri eksterlandaj aferoj de EU decidis definitive nuligi la sankciojn kontraŭ Kubo, kiuj estis enkondukitaj en 2003, sed suspenditaj en 2005. Ĉi tiu decido, kiu ne estis malkontestata, estis ligita kun la alvoko al Kubo plibonigi la staton de la homaj rajtoj en la lando. En oktobro EU subskribis kun Kubo komunan deklaron pri ekonomia evoluo kaj humanitara helpo kun la celo plibonigi la diplomaciajn rilatojn, kiuj suferis depost sia rompo en 2003. Dum sia vizito al Kubo, la ŝtatestro de Ĉinio, Hu Jintao, subskribis serion de kontraktoj kun la celo fortigi la komercan, investan kaj eksportan agadon. Post Venezuelo Ĉinio fariĝis la dua plej grava komerca partnero de Kubo. Sammonate alvenis al Kubo ankaŭ la rusa prezidento Medvedev, kiu vojaĝis tra Latinameriko kaj kiu subskribis en Havao serion de duflankaj kontraktoj, traktante ankaŭ demandojn de la armea kunlaboro. En decembro Kubo estis akceptita en la t.n. Rio-grupo, kiu estas unuiĝo de 22 latinamerikaj kaj karibaj ŝtatoj, fondita en 1996. Okaze de sia reciproka vizito en Ruslando, Raúl Castro subskribis 34 kontraktojn kaj Kubo ricevis rusan krediton en alteco de 20 miliardoj USD, kiu estu uzata por la aĉeto de rusaj industriaj instalaĵoj. En decembro okaze de milita ekzerco inter Venezuelo kaj Ruslando unuafoje post la fino de la Frida Milito ankriĝis rusaj militŝipoj en Havano.

2009

En januaro okazis en Santiago de Cuba kun 3000 invititaj gastoj la centra festakto okaze de la 50a jariĝo de la kuba revolucio kaj de la venko de Fidel Castro super Batista. Neniu eksterlanda ŝtatestro ĉeestis la festakton. Pro sia malsaniĝo Castro mem ne povis partopreni la festadon de la 50-jara jubileo kaj bondeziris sian popolon tra la amaskomunikiloj. En la malsanulejo li akceptis la prezidentojn de Venezuelo, Chávez, de Bolivio, Morales, kaj de Nikaragvo, Ortega. Post la transpreno de la povo en la ŝtata kaj partia aparato Raúl Castro Ruz klopodis firmigi ĝin. En marto li interŝanĝis en la registaro aron da homoj proksimaj al Fidel kun propraj lojaluloj. Laŭ oficiala legmaniero ĝisnunaj ŝlosilaj figuroj kiel la vicprezidentoj de la ŝtata konsilio, la ministroj pri eksteraj rilatoj kaj pri ekonomio kaj naŭ ceteraj ministroj demisiis post kiam ili kritikis siajn proprajn „politikajn erarojn“. Kompare kun la stagnado en la interno, iom moviĝis la eksterpolitika vivo. Komence de marto estis instalita nova kuba ministro pri eksteraj aferoj (Bruno Rodríguez Parrilla, nask 1958), iama kuba ambasadoro ĉe UN. Observeblis nova serio de vizitoj de latinamerikaj ŝtatestroj en Kubo: En februaro en Kubo restadis la prezidentino de Ĉilio, Bachelet Jeria, kiu estis la unua vizito de ĉilia ŝtatestro depost 37 jaroj. Fine de majo estis restarigitaj la diplomaciaj rilatoj kun Salvadoro kaj Kostariko, kiuj estis rompigitaj en 1959. Tiel, Kubo iom post iom revenadis en la eksterpolitikajn strukturojn de la regiono. La plej signifa ŝanĝo tamen okazis en la rilatoj kun Usono: En marto Usono konsentis pri mildigo de la kondiĉoj pri vojaĝoj kaj devizoj. Okaze de la aprila pintkonferenco de la 34 OAS-ŝtatoj en Trinidado kaj Tobago, la nova usona prezidento Barack Obama proponis plibonigi la rilatojn kun Kubo. Sed Raúl Castro rifuzis la proponon de Organizo de Amerikaj Ŝtatoj (OAS), kiuj

intencis reakcepti Kubon kiel plenmembron kun la argumento, ke OAS ĝis nun subtenis la malamikan sintenon de Usono kontraŭ Kubo. Tamen, en junio Kubo konsentis akcepti la proponon de Usono trakti diversajn demandojn, ekzemple tiun pri la rifuĝintoj. Sed ĉi tiu degela periodo ricevis fortan baton post kiam oni arestis iun eksan oficiston de la usona ministerio pri eksteraj aferoj, kiun oni suspektis pro transdonado de sekretaj informoj favore al Havano dum 30 jaroj. Krom tio, en televida intervjuo Juanita Castro, la fratino de Fidel kaj Raúl, konfesis, ke ŝi kunlaboris dum 1961-64 kun la usona sekreta servo CIA, do en tempo kiam ekzistis planoj mortigi la kuban gvidanton. Juanita fuĝis al Florido en 1964 kaj definitive rompita kun sia fama frato, kiun lia filino Alina ne hezitis nomi „memjusta tirano“. En novembro Human Rights Watch publikigis centpaĝan raporton sub la titolo „New Castro, Same Cuba“ (vd. sube la retligon al tiu dokumento) kaj dokumentis la malrespektojn de la homaj rajtoj en Kubo. Laŭ la listo de la organizo „Reporteroj sen limoj“ Kubo okupis en 2009 la 170an rangon (2008: 169), kio signifas, ke la libereco de la gazetaro en tiu lando estis ekstreme malgranda (pli malgranda ĝi estis nur en Birmo, Irano, Turkmenio, Nordkoreo kaj Eritreo). Jarfine ankaŭ papo Benedikto XVI. postulis pli da rajtoj por sia eklezio en Kubo.

2010

Kun akra protesto la madrida registaro reagis al la ago flanke de Kubo malhelpi al la hispana socialista parlamentano Luis Yáñez kaj ties edzino eniri Kubon. La politikisto vojaĝis al Havano kun la celo senstreĉi la rilatojn inter ambaŭ landoj, sed en la flughaveno li estis rifuzita kaj resendita al Hispanio. Nova skandalo kun internacia atento ekplodis, kiam la 23an de februaro mortis en Havano en la aĝo de 42 jaroj la kubano Orlando Zapata Tamayo post 85-taga malsatstrikto kiel protesto kontraŭ siaj arestokondiĉoj en prizono en Camagüey. En 2003 Zapata estis kondamnita al 18-jara punaresto. La estro de la kuba komisiono pri homaj rajtoj, Elizardo Sánchez, riproĉis al la reĝimo, ke temas pri intencita murdo, ĉar la kubaj instancoj ne helpis lian savon. Ankaŭ la patrino de la viktimo kulpigis la kubajn instancojn pro la morto de sia filo. La publika entombiga ceremonio por Zapata estis malpermesita de la polico, kiu tiuokaze arestis 126 personojn, inter alie la mondkonatan kuban blogulinon Yoani Sánchez, kiu registris kaj disvastigis la eldirojn de la patrino de Zapata. Laŭ komuniko de la kuba ministerio de eksterlandaj aferoj, Raúl Castro bedaŭris la morton de la disidento. La Eŭropa Parlamento kondamnis kun grandega plimulto de la voĉoj la „eviteblan kaj kruelan“ morton de Zapata. Sed Fidel Castro, kiu komentis la morton de Zapata, rifuzis ĉian kulpon flanke de la reĝimo. Pro solidareco kun Zapata ankaŭ la ĵurnalisto Guillermo Fariñas komencis malsatstriki kaj devis esti transportita al la malsanulejo. Ankaŭ la internacia konata kuba kantisto Silvio Rodríguez unuafoje publike kritikis la kurson de la registaro. Laŭ pritakso de la tolerata homrajta asocio „Blankaj Damoj“ en la momento de la morto de Zapata ekzistis ĉirkaŭ 200 politikaj arestitoj. Tri jarojn post la transpreno de la povo far Raúl, la iluzioj do estas disbatitaj, kaj iuj observantoj rimarkis, ke kun la pli bona sanstato de Fidel Castro la situacio en Kubo rilate la sorton de la disidentoj malmoliĝis. La nova ŝtatestro same brutale traktis la opozicion kiel lia frato faris tion, diris José Miguel Vivanco, la gvidanto de la latinamerika sekcio de Human Rights Watch; kiu en Kubo estas kritikema, tiu devus vivi en konstanta timo. Reage al la morto de Zapata, la maldekstreme liberala madrida gazeto *El País* postulis de Eŭropo, ke ĝi forigu la diktaturon en Kubo per diplomatio. Ankaŭ Ĉilio distanciĝis de la reĝimo

en Kubo. La 24an de februaro okazis en Havano renkontiĝo inter Fidel Castro kaj Luiz Inácio Lula da Silva, prezidento de Brazilo. De diversaj medioj Lula estis kritikita pro hipokriteco vidalvide de Kubo. Por subfosi la diktaturajn reĝimojn, Usono plifaciligis la aliron al interreto por Kubo, Irano kaj Sudano.

La Aŭstra-Kuba Societo, kiu evidente estas reĝimproksima, plendis en publika mesaĝo kontraŭ la nova internacia unuflankeca kondamnokampanjo kontraŭ Kubo kaj atentigis, ke en la kazo de Zapata temis pri simpla krimulo, kiu estis arestita kaj kondamnita pro diversaj krimaj agadoj (kontraŭleĝa eniro en domon, provita murdo, trompo kaj malpermesita posedo de armiloj, agresado kontraŭ kunprizonanoj kaj gardopersonaro).

Post nova paca protesto flanke de la ‚Blankaj damoj’ en Havano, la kuba polico disbatis en marto la grupon de virinoj, el kiuj 30 estis arestitaj kaj kelkaj devis esti flegitaj en la malsanulejo. En aprilo Raúl Castro forte kritikis Usonon kaj Eŭropan Union, al kiuj li riproĉis, ke ili faras laŭtan kalumnian kampanjon kontraŭ Kubo. Hillary Clinton, ministro pri eksterlandaj aferoj de Usono, riproĉis al Kubo, ke ŝi havas la impreson, ke ĝia registaro ne deziras normaligi la rilatojn kun Usono, kvankam Vaŝingtono sub Barack Obama klopodas plibonigi la situacion. Per la aresto kaj enprizonigo de Virgin Dania García, sendependa ĵurnalistino kaj blogulino, publike apoganta la ‚Blankajn damojn’, la kuba ŝtato unuafoje punis tiuspecan virinon, kondamnante ŝin al unu jaro kaj ok monatoj da malliberejo. Samtempe okazis en Kubo komunumaj balotoj (elektroj de la t.n. popolaj konsilistoj, ĉ 15’000), kiuj efektiviĝas en protesta etoso kontraŭ la kampanjo, kiu en Usono kaj Eŭropo estis lanĉita kontraŭ Kubo pro la morto de Zapata. Kardinalo Jaime Ortega rifuzas partopreni komunan konferencon kun Raúl Castro. Anstataŭ tio li alvokis la kuban registaron finfine enkonduki reformojn, kaj li admonis, ke la prokrasto de tiuj reformoj povus provoki ĉe la popolo „senpaciencon kaj malagrablajn sentojn“. La kolombia gazeto *El Tiempo* raportis antaŭnelonge, ke en la pasintaj sep jaroj ĉirkaŭ dumil kubaj kuracistoj, kiuj estis interŝanĝe kontraŭ nafto senditaj al Venezuelo, fuĝis al Kolombio, kaj ke la fuĝa ondo ne ĉesas. Pli ol dumil intelektuloj kaj artistoj subskribis proklamon pri soldareco kun la socialisma registaro en Kubo; la koncerna dokumento estis publikigita en Bonaero, Argentino. Okaze de la unua de majo centmiloj da kubanoj amasmanifestaciis en Kubo kaj hurae respondis en ĥoro al tra mikrofone disaŭdigitaj sloganoj kiel „vivu la revolucio“, „vivu Fidel kaj Raúl“.

En julio, la 95a Universala Kongreso de Esperanto okazis en Havano, Kubo.

Spegulo

Kelkaj retaj resursoj pri kubaj politikaj aferoj kaj homaj rajtoj:

http://www.embacubalebannon.com/cur_min1.html

http://en.wikipedia.org/wiki/Human_rights_in_Cuba

http://en.wikipedia.org/wiki/Cuban_democracy_movement

<http://www.amnesty-kuba.de>

<http://www.hrw.org/de/reports/2009/11/18/new-castro-same-cuba-0>

<http://www.reporter-ohne-grenzen.de>

<http://www.desdecuba.com/generaciony> (bloga de Yoani Sánchez)

<http://www.cubadebate.cu>

<http://www.cubanet.org>
[http:// www.cubanuestra.nu](http://www.cubanuestra.nu)
<http://www.therealcuba.com>
<http://www.miscelaneasdecuba.net>
<http://www.elnuevoherald.com>
<http://www.granma.cubaweb.cu/secciones/ref-fidel/index.html>
<http://www.cuba.cu/gobierno/reflexiones/reflexiones.html>
<http://www.cuba.cu>
<http://www.granma.co.cu>
<http://www.granma.cu/ingles/index.html>
<http://www.granma.cu/aleman/index.html>
<http://emba.cubaminrex.cu>

La historio verŝajne ne plu absolvos lin²

Senlegenda biografieto pri Fidel Castro Ruz

en la kunteksto de la politiko kaj ideologio

Deveno kaj familio

Fidel Alejandro Castro Ruz naskiĝis oficiale la 13an de aŭgusto 1927³ en la bieno de la patro en Birán (apud Mayarí, provinco Oriente, nuntempe provinco Holguín) en la ekstrema nordoriento de Kubo. La familio apartenis al la pli altnivela socia tavolo. La patro, Ángel Castro y Argiz, kiu naskiĝis en malriĉa familio en Galicio (Hispanio), venis dum la sendependiga milito de la kubanoj en 1895 kiel soldato de la hispana kolonia armeo sub generalo Weyler al Kubo por tie subpremi la kuban ribelon. Post la hispana kapitulaco li reiris al Hispanio sed revenis en 1906 al Kubo por definitive resti sur la kariba insulo kaj por serĉi kaj trovi sian bonŝancon kiel sukera komercisto. Laŭ priskribo de samtempoj al liaj karakteraj trajtoj apartenis: inteligenteco, organiza kapablo, persista laboremo, disciplino, grumblemo, malavaro, humanitaro. Laŭ alia, pli kritika fonto la patro estis kruda tipo, inklinita al perforto kaj kutime kverelis kun la najbaroj, li eĉ estis kulpigita pro murdo al iu laboristo. Fidel poste memoris, ke la malfeliĉa situacio de la laboristaro en la kamparo impresis lin kaj vekis en li sentojn pri justeco kaj ribelemo. Kiam patro Ángel forpasis (1956) oni taksis lian posedaĵon je duonmiliono da dolaroj (777 hektarojn li posedis kaj pliajn 9712 hektarojn li luprenis). Sed Ángel posedis ankaŭ gastejon, telegrafejon, vendejojn por viando kaj pano, plurajn metiejojn kaj malgrandan lernejon. Kun la unua edzino María Luisa Argota, Ángel Castro havis du infanojn, Emilio kaj Lidia. Sed la patrino de Fidel kaj de liaj ses gefratoj Angela (Angelita), Ramón, Raúl, Juana (Juanita), Enma kaj Agustina estis alia virino: Linda (aŭ Lina) Ruz González, kiu laboris kiel domhelpantino ĉe la patro ĝis la morto de María Argota. Tiun duan virinon Ángel Castro edzinigis nur en 1941⁴. Ambaŭ virinoj estis senalfabetulinoj. Fidel Castro do estis infano el ekstergeedzeca rilato. Dum la rilatoj de la infanoj al ties gepatroj estis karakterizitaj kiel malfacilaj, la rilatoj inter la gefratoj mem devis esti sufiĉe bonaj. La persona nomo ‚Fidel‘ ŝajne devenas de Fidel Pino Santos, kiu estis amiko de patro Ángel. Ĉar Fidel ne estis baptita post sia naskiĝo, oni primokis lin en la lernejo kiel ‚judon‘. Kiam li tamen estis baptita en la oka jaraĝo, li ricevis la nomon Fidel Hipólito Ruz laŭ la baptopatro Luis Hipólito Alcides Hibbert, kiu estis la haitia konsulo kaj konato de la familio, ĉe kiu Fidel loĝis portempe. La nomo Castro ne aperis en la baptodokumento, ĉar la patro ankoraŭ ne agnoskis siajn infanojn, kiujn li havis kun Lina Ruz González. Nur en 1943 li ricevis sian definitivajn nomon Fidel Alejandro Castro Ruz. Oni rakontis, ke Fidel reagis al la morto de sia patro kun stoika indiferenteco.

² Aludo al la citaĵo de Fidel Castro: „La historo absolvos min“.

³ koncerne lian naskiĝjaron ŝajne okazis manipulo, tiel ke oni ne scias definitive, ĉu Fidel Castro naskiĝis en 1927 aŭ en 1928. Laŭ alia teorio la jaro 1927 devenas el sovetia biografio. En letero de Fidel Castro el la jaro 1940 al Franklin D. Roosevelt li asertis, ke li estas 12-jara, kio signifus, ke li naskiĝis en 1928.

⁴ Nathaniel Weyl (1963) indikis, ke la dua geedziĝo ne estis validigita.

Lernejo, studado, profesio kaj geedziĝo

Unue Fidel vizitis malgrandan vilaĝan lernejon en Mayarí, poste la lernejon La Salle en Santiago de Cuba. Aŭ pro lernejoj meritoj, aŭ ĉar la knabo estis malfacile edukebla kazo por la tieaj instruistoj, en 1942 Fidel estis transdonita al la prestiĝa lernejo Belén en Havano, kiu estis gvidata de jezuitoj. Ĉi tiun lernejon vizitis ankaŭ lia frato Raúl. La plej ŝatataj fakoj de Fidel estis historio, lingvoj kaj sporto. En tiu tempo li konatiĝis kun la verkaĵoj de José Martí,⁵ el kiuj li poste ĉiam ŝatis citi. Laŭ propra klarigo, de la jezuitoj Castro lernis sincerecon kaj severecon. Post la abiturientiĝo en 1945 Castro komencis studi juron en la universitato de Havano, ĉar li celis defendi la justecon. Tie li atentigis pri si per politika engaĝiĝo, apartenante al iu grupo, kiu estis konata kiel „Los muchachos de gatillo alegre” (la facilpafaj knaboj aŭ simile). Malofte sen pistolo en la poŝoj, Castro fariĝis prezidanto de la Asocio de juraj studentoj, fondis studentan komisionon kontraŭ rasa diskriminacio kaj aliĝis en 1947 al la t.n. Ortodoksa Partio de Eduardo Chibás, kiu kontraŭbatalis la koruptan registaron de Carlos Prío Socarrás, pledante por adekvata politiko, kiu respektus la naciajn interesojn. Malgraŭ alta staturo, pasio kaj oratora kapablo, Fidel komence tute ne sukcesis ludi la gravan rolon, kiun li revis ludi. Dum Fidel tiam konsideris sin „utopia socialisto“, lia frato Raúl fariĝis komunisto. En 1948 Fidel edziĝis al Mirtha Díaz Balart, studentino pri filozofio, kiu naskis la filon Fidelito. Post la sukcesa studfino en civila juro kaj socisciencaj fakoj en 1950, Castro doktoriĝis kaj aliĝis al iu advokata oficejo por samtempe pretigi sin por la politika kariero. En la jurista praktikejo li laboris ĝis 1952. Kiam Fidel enprizoniĝis post la Moncada-procezo (1953), la geedza paro divorcis.

La tempo en Kubo antaŭ Fidel Castro

En la jaro 1940 Fulgencio Batista y Zaldívar (1901-73) estis elektita kiel prezidento de Kubo. Sed en la elektoj de 1944 Batista ne plu povis kandidatiĝi, kaj lia deĵoranta ĉefministro estis promociita. Sed la balotojn venkis la burĝa kandidato Grau. Batista dume retiriĝis de la politiko kaj iris al Florido. En 1948 Batista revenis al la kuba politiko kaj estis elektita kiel senatano, tamen sen politika influo. Samtempe li fariĝis lobiisto de la usona mafio, kiu transformis la kuban ĉefurbon al delekta paradizo por nordamerikaj turistoj kaj por eviti la usonan justicon. Vide al la balotoj de 1952 Batista fondis propran partion, sed ne sukcesis trovi sufiĉan apogon de aliaj partioj por formi koalicion. Sekve Batista akceptis la proponon de kelkaj oficiroj lanĉi armean puĉon, kio funkciis glate dum la karnavala tempo – tiel ke prezidento Carlos Prío Socarrás fuĝis tra Meksiko al Usono. Kvankam Usono estis surprizita de tiu puĉo, ĝi finfine tamen agnoskis la registaron de Batista. Nun alvenis la tempo de Fidel Castro: li jure plendis kontraŭ Batista pro rompo de la konstitucio, sed vane. Kiam la jura vojo fiaskis, Castro komencis organizi la perfortan reziston kontraŭ Batista. En somero 1953 li pretigis centkvindek da junaj homoj, ĉefe studentoj, por entrepreni tre riskan subteran aventuron. Samtempe oni planis ataki la kazernon de Moncada en Santia go, en la oriento de la insulo. Castro esperis, ke elde oriento kreskos la ribelo kaj devigus la

⁵ José Julián Martí y Pérez (1853-95), estis fama kuba politikisto, ĵurnalisto, filozofo, poeto kaj nacia heroo, kiu pereis dum la sendependiga milito de 1895.

diktatoron demisii. Sed la tuta entrepreno malsukcesis jam en la unua stadio de la atako. Kiam la junaj diletantaj ribeluloj foruzis sian municion, ili estis venkitaj de la soldatoj kaj la plimulto el ili mortigitaj, post terura turmentado, kiu fariĝis tutlande konata, ĉar publike efektivigita kun la partopreno de Batista-soldatoj kaj anoj de la sekreta servo. Fidel kaj kelkaj kompanjeroj sukcesis eskapi la buĉadon, sed iom poste estis tamen kaptitaj kaj povis resti vivaj nur dank' al la interveno de la ĉefepiskopo de Santiago, kiu estis simpatianto de la familio Castro, kaj de kelkaj raciaj soldatoj. Post sia aresto Castro estis transdonita al la justico. La 16an de oktobro okazis la jura proceso en Santiago de Cuba. En sia fama defenda parolado Castro prononcis la frazon „La historio min absolvos!“ (hispane: „La historia me absolverá!“). En tiu parolado li skizis la kvin punktojn de sia ‚frukastrisma‘ programo: 1e: revalidigo de la konstitucio de 1940; 2e: disdonado de la terposedo al etkampanoj kun rekompencado de la ĝisnunaj posedantoj; 3e: 30-procenta gajno-partopreno de la laboristoj en grandaj entreprenoj; 4e: 5-procenta gajno-partopreno de la sukerkanaj kamparanoj en la rikoltoj kaj garantio de minimuma kvoto por malgrandaj sukerplantistoj; 5e: konfiskado de neleĝe akaparita posedo pere de specialaj tribunaloj. La programo de Castro estis tiom radikala por plibonigi la strukturojn de la kuba ekonomio, kiel ĝin proponis ankaŭ la Internacia Banko por rekonstruado kaj evoluado. Do, tute ne temis pri ‚socialismo‘, ‚marksismo‘ aŭ eĉ ‚komunismo‘, sed pri reformo en la direkto de la ekvilibrata meztavola societo de malgrandaj proprietuloj. La politika parto de la ‚programo de Castro‘ evidente antaŭvidis la revenon al la konstitucieco kaj ŝtata jureco, la restarigon de la civitanaj rajtoj kaj la politikan demokration. Sed la programo inkluzivis ankaŭ la ideon, ke tiu demokratio ne estu restarigita pere de la tuteco de la popolo, sed pere de la ‚batalantaj amasoj‘, kio kongruis kun la ideoj de la ortodoksoj, formante la bazon de la pli posta kastrismo.

La nova vivo de Fidel Castro

En oktobro 1953 Castro estis kondamnita al punaresto por 15 jaroj en prizono sur la pinia insulo (poste: Insulo de la Junularo). Sed la arestaj kondiĉoj estis kompare mildaj – tiel ke eblis flegi kontaktojn kun eksteruloj kaj aliri la literaturon. Laŭ propra klarigo, en la malliberejo Castro trovis novan vivosencon, la ‚terura lernejo‘ de la malliberejo formis la mondkoncepton de Castro, tiel ke li povis komenci novan vivetapon, ja novan vivon enute, kaj li eksentis la emon sinoferi kaj batali por pli bona, pli justa vivo, kiu ne nur limiĝas je la mizeraj bagateloj de komforto kaj profito. Li volis ŝanĝi sian landon fundamente. Okaze de ĝenerala amnestio, la 15an de majo 1955 Castro estis liberigita kaj iris al Meksiko, kien sekvis lin 82 samideanoj, por kolekti la necesajn fortojn kaj prepari la deeksteran invadon de Kubo. Sub la gvido de la hispana eksgeneralo Albert Bayo, kiu partoprenis la hispanan enlandan militon flanke de la respubliko kontraŭ Francisco Franco, komenciĝis la armea trejnado de la ontaj kubaj gerilanoj. Tie Fidel renkontis ankaŭ la argentinan kuraciston Ernesto Guevara, poste nomata ‚Ĉe‘. Kiam Fidel forlasis la Ortodoksan Partion, li fondis kune kun siaj kompanjeroj la propran Movadon de la 26a de julio (M-26-7). Ĝia strategio estis la subtera armita batalo kun la celo disvastigi la ĉelojn tra la tuta lando. La 25an de novembro 1956 Fidel startis kun Ĉe Guevara, Camilo Cienfuegos kaj lia frato Raúl kaj 78 aliaj revoluciuloj el Tuxpan per la jahtoŝipo ‚Granma‘ en la direkto de Kubo, kie la 2an de decembro 1956 oni

atingis la kuban bordon ĉe la Porka Golfo. Sed la katastrofo, kiu atendis la invadintojn, estis kruelega: nur 12 el 83 el ili travivis la kontraŭatakon de la registaraj ‚bonvenigantoj‘, tiel ke alian eblon ol fuĝi en la montaron de Sierra Maestra ili ne havis. La gazetoj tiam anoncis ilian pereon. Kiel *Comandante en Jefe* Fidel Castro nun persone gvidis la membrojn de M-26-7, kiuj en la montaro de la provinco Oriente fariĝis veraj gerilanoj. Tiam la trajtoj de Fidel Castro profunde ŝanĝiĝis: de la sentema, honesta, ‚akademieca‘ kaj disciplinita revolucia strategiulo li fariĝis la kaprica, ne plu prikalkulebla aventuristo. La celo de la gerilanoj, kies modelo estis la maoisma koncepto, estis la konkerado de la urboj elde la montaro kaj kamparo. Cetere, la ĉefo de la urba M-26-7 estis la konvinkita antikomunisto Frank País, kiu en junio 1957 estis likvidita de la polico de Batista. Tiu incidento kaj vakuo kaŭzis ĉe la ribela armeo de la barbuloj en la montaro militan elitajn konscion, kiu ĉe Castro estis kombinita kun forta antipatio kontraŭ la grandurbo en si mem (Havano). Sed la kriteriaro por ke tiu ribela armeo venku, estis plurobla: ekzemple Castro devis certiĝi, ke Usono ne invados la insulon favore al Batista. En tiu senco Castro evitis ĉion, kio povis damaĝi liajn estontajn politikajn intencojn kaj faris ĉion por diskrediti Batistan antaŭ la publiko. La metodo de Castro konsistis en aro de provokoj, kiuj estis responditaj de kreskanta kontraŭteroro. Sed tiuj teroraj rimedoj perdigis al Batista sian plej lastan krediton ĉe la popolo, kaj la tempo, en kiu li ankoraŭ povis esperi, ke lia regado estos konfirmita en liberaj balotoj (en somero 1957) rapide pasis. Castro utiligis sian psikologian kapitalon kaj fine triumfis super komplete senmoraliginta, pasiva kaj korupta malamiko. La popolo observis la iom-postioman disfalon de la polica kaj armea aparato de la ŝtato kun kreskanta simpatio por la ribeluloj el la montaro, kiuj ŝajnis daŭrigi la naciliberigan lukton de la kubanoj kaj kiuj, kompare kun la batistanoj, respektis la posedaĵon de la malgrandaj homoj. Alia ruza taktiko de Castro konsistis en tio, ke li prokrastis konsenti pri unuiga kontrakto kun la internaj aliancitaj opoziciuloj, ĝis kiam lia propra movado M-26-7 estis sufiĉe forta kaj ne plu ekzistis la danĝero, ke liaj konkurentoj povus profiti de la meritoj de la movado de Castro. Post kiam la premo por Batista tamen fariĝis tro forta, la sindikatoj kaj burĝaj demokratoj alprenis la kontraŭan flankon kaj Usono lanĉis embargon kontraŭ Kubo post masakro al opoziciuloj; Batista cedis kaj la unuan de januaro 1959 forlasis la insulon kaj eniris la Dominikanan Respublikon. Malgraŭ tio Usono ne subtenis la revolucion de Castro kaj daŭre defendis la malnovan reĝimon. Samtage Castro okupis la urbon Santiago kaj la kazernon de Moncada, avancis en la direkto de la ĉefurbo kaj post ĝia okupado far Camilo Cienfuegos eniris ĝin por triumfe venki kaj sen devi dividi sian venkon kun aliaj. La venko super la tirano Batista estis aplaŭdita de la popolo, ĝia entuziasmo por la venko de la nigrabarbulo kun la olivverda uniformo grandega, tiel ke pri Castro oni baldaŭ parolis pri la nova Simón Bolívar.

Kubo sub la gvido de Fidel Castro

Kvankam Castro unue hezitis akcepti ŝtatan oficon, li decidis de facto la aferojn de la ŝtato, tiel ke sen lia aprobo nenio okazis kaj liaj ministroj nenion faris. Post la demisio de la ĉefministro Castro mem transprenis la oficon de la ĉefministro. Koncerne la sintenon vidalvide de Usono, komence Castro ne kontraŭis ĝin, kaj li eĉ ricevis subtenon el Usono. Lian unuan oficialan viziton li faris al Usono, kie malgraŭ lia deziro li ne estis akceptita de prezidento Eisenhower, sed nur de vicprezidento Nixon. Tion li

konsideris kiel humiligon. Post pluraj malamikaj agadoj ambaŭflanke kaj precipe post ripetaj provoj de CIA mortigi Castron, la kubano ŝanĝis sian sintenon kaj Usono fariĝis la unua malamiko de Castro, kio kaŭzis malbonegajn rilatojn inter ambaŭ ŝtatoj ĝis la nuna tago.

Interne, kiel oficiala politikisto Castro multon promesis. Li promesis, ke ministroj estu anstataŭitaj, se ili malbone plenumas sian laboron. Li promesis respekti la publikajn rajtojn kaj liberecojn. La revolucio celis esti humanisma, ĝi volis sekvi la trian vojon inter la okcidenta kapitalismo („libereco sen pano“) kaj la orienta socialismo („pano sen libereco“) – la tria vojo estus „libereco kaj pano“. Tamen, baldaŭ kiam tiuj promesoj kaj vizioj montriĝis iluziaj, la politiko de Castro kaj li mem perdis multajn apogantojn, precipe ĉe la urbaj mezaj tavoloj kaj la sindikate organizitaj laboristoj. Li ankaŭ distanciĝis de kelkaj malnovaj kunbatalantoj, kiuj elmigris, estis ĵetitaj en la prizonon aŭ mistere perdis sian vivon. En julio 1959 li elŝanĝis la personon en la ofico de la ŝtatestro, la burĝa liberalulo Manuel Urrutia estis anstataŭita de la komunisto Osvaldo Dorticos. En aŭtuno de la sama jaro okazis nova skandalo: Kiam Huber Matos (*1918), unu el la kungerilanoj de la ribelo post la alveno de ‚Granma‘ en Kubo, protestis kontraŭ la pli kaj pli forta influo de la komunistoj ĉirkaŭ Raúl Castro kaj Ĉe Guevara kaj avertis la danĝeron de komunistika diktaturo, li ricevis seriozajn problemojn. Kiam Raúl fariĝis la estro de la armeo, Huber Matos demisiis kiel milita guberniestro de la provinco Camagüey. Li estis arestita, akuzita pro perfido kaj kondamnita pro kontraŭrevolucia agado al 20jara punaresto (kiujn li devis plene trapasi en la malliberejo), anstataŭ mortpuno (en 1979 li estis liberigita kaj elmigris al Usono, kie li ekaktivis en la ekzilkuba organizo, skribis libron kaj publike pledis favore al sankcioj kontraŭ Kubo, inkluzive de la ebleco likvidi la kuban ŝtatestron Fidel Castro).

Surbaze de sia socia deveno kaj de la politika evoluo dum iu tempo Castro ankoraŭ funkciis kiel peranto inter la revolucio kaj la burĝaj-liberalaj movadoj, kiujn li baldaŭ elŝaltis. Sed pli kaj pli la komunistoj, al kiuj sin kalkulis frato Raúl, transprenis respondecon kaj komencis glaciigi la situacion. Ŝajnas, ke Castro esperis, ke li povos kontroli la lojalajn komunistojn, ĉe kiuj cetere ne estis klare, ĉu ili submetiĝos al la nova *Máximo Líder* aŭ ĉu ili intencis senpotenci lin. Ŝajnas, ke la dua varianta preskaŭ efektiviĝis en 1962 kaj denove en 1968. Sed Castro konvene reagis al iuj konspiroj kaj ĝustatempe eliminis potencialajn danĝerojn. Dume Raúl kaj Ĉe Guevara akcelis la rilatojn kun la komunistaj ŝtatoj, sed Fidel restis skeptika. Nur post persona renkontiĝo kun Nikita Ĥruŝĉov rando de la UN-plenkunveno en 1960 li malrapide ĉesigis sian malfidon. La ‚kuba krizo‘ de 1962, kiu riskis novan mondmiliton, kondukis al nova streĉiteco kun la komunistika ĉefpotenco. Castro ĉagreniĝis, ĉar Sovetunio retiris siajn raketojn sen konsulti la opinion de Castro. Malgraŭ tio Fidel fariĝis ‚Heroo de Sovetunio‘ (1963). La tensioj eĉ pli fortiĝis post la puĉo kontraŭ Ĥruŝĉovo en 1964 kaj pro la simpatio, kiun Ĉe Guevara esprimis por la maoismo kaj eĉ pli post intencita puĉo kontraŭ Fidel Castro, kiu estis planita de Aníbal Escalante en interkonsento kun Moskvo fine de 1967.⁶ La stelo kaj la internaciismo de Fidel Castro komencis rapide velki,

⁶ Fabian Escalante, la iama ĉefo de la kuba sekureco, kiu devis protekti ankaŭ Fidel Castron, asertis, ke al li estis konataj entute 638 murdatencoj kontraŭ Castro, kiujn preparis ĉefe CIA, ekzilkubanoj kaj la usona mafio. CIA konfirmis ĝis nun nur ok tiajn murdatencojn. Antaŭviditaj estis la apliko de plej diversaj rimedoj, de veneno ĝis bomboj. Ankaŭ la sankcioj de Usono kontraŭ Kubo celis la falon de Castro kaj la paralizadon de la kuba ekonomio en tiu grado, ke tiuj sankcioj kundukus ene de kelkaj semajnoj al la forigo aŭ likvido de Castro. Komence de majo 2004 Colin Powell, la tiama usona ministro pri eksteraj

despli ke la komunistaj gvidantoj de la latinamerikaj ŝtatoj forlasis la kuban vojon kaj rekte sekvis la sovetian ekzemplon, dum Castro daŭrigis fokusigi sian propran internaciisman koncepton al la konflikto pri la „imperiismo“ kontraŭ la ‚Tria Mondo‘ kaj al la konflikto inter Nordo kaj Sudo. La pragan ribelon de 1968 Castro primoke kritikaĉis pro tio, ke laŭ li la ĉeĥoj postkuris la fruktojn kaj promesojn de la kapitalismo, sed Sovetunio li samtempe kritikis, ĉar laŭ li ĝi pekis, misatentante la rajton je suvereneco de la ĉeĥoj kaj slovakoj kaj rompante la internacian juron. Sed li ne ĉesis pravigi la ekziston de Sovetunio, kiu laŭ li garantiis la kontraŭpuŝadon de la imperiismo. Samtempe li mallaŭdis ĝin, ke ĝi ne sufiĉe sisteme kontraŭbatalis la influon de la „imperiismo“, inkluzive de Latinameriko kaj de la cetera Tria Mondo kaj do elpaŝis kiel dubinda moralapostolo de la revoluciaj principoj. Sed li komplete forgesis kaj neglektis la ekonomiajn problemojn. La komunismaj tendencoj en la politiko, la transformo de la kuba agrikulturo laŭ la maniero de sovĥozoj, kiu praktikis la konfiskon de la nordamerika terposedo, reagigis la usonajn politikistojn, kiuj ĝis nun kun skeptika pacienco observis la evoluon en Kubo. Kiel poste fariĝis konate, dum la elektokampanjo de John F. Kennedy (1960) estis diskutite, ĉu oni forigu Fidel Castron de la povo, ĉu oni eĉ entute elŝaltu lin pere de murdatenco. Post iom da ŝanceliĝado pri la elektenda vojo vidalvide de Usono, ŝajnas ke Castro finfine lasis sin influi de Raúl kaj Ĉe Guevara kaj elektis la kolizian kurson kaj definitive rompis kun Usono ankaŭ eksterpolitike, despli ke Sovetunio pretis transpreni la nordamerikan pozicion en Kubo. Krom tio, tiu elekto estis ideologie kaj propagandisme oportuna kaj dezirinda. Tiel oni povis ilustrati la „ĉantaĝan politikon de la imperiistoj“. Al la konfisko de la nordamerika tero en Kubo Usono reagis per la fermo de la merkato por kuba sukero kaj enkondukis eksportan embargon por usonaj produktoj al Kubo. Al tiu embargo aliĝis inter 1964 kaj 1970 la plimulto de la latinamerikaj ŝtatoj, kun kiuj Castro sekve rompis la rilatojn. Tiel Usono fariĝis la konstanta kaj eterna traŭmato por Kubo, kaj Kubo por Usono, tiel ke Jean Paul Sartre, kiu tiutempe restadis en Kubo, sarkasme komentis la dilemon jene: „Se Usono ne jam ekzistis, oni devintus ĝin inventi por la revolucio de Castro.“ En tute alia senco tiu frazo validis por dekmiloj da kubaj elmigrintoj, kiuj tiam petis en Usono politikan azilon. La interna opozicio estis marĝenigita kaj ĝiaj anoj proklamitaj kiel ŝtataj malamiko.⁷ La provo far kubaj elmigrintoj, kiu estis apogita de la usona sekreta servo, invadi la landon ĉe la sama Porka Golfo en aprilo 1962 fiaskis.

La rolo de la ideologio kaj ĝia efiko al la reala politiko

En tiu tempo Fidel Castro metamorfoziĝis, nomante sian revolucion socialisma kaj sin mem socialisto, kaj la unuan de decembro 1961 li proklamis sin „dumviva marksistoleninisto“. Ŝajnas, ke nur per tiu ŝaktiro la pluekzistado de Fidel Castro kiel politika gvidanto povis esti sekurigita, ĉar ekzistis la danĝero, ke la malnovaj komunistaj funkciuloj povus ideologie superi kaj politike postkuri lin. Surbaze de la marksisma-

aferoj, submetis 500-paĝan raporton de la ‚Konsila Komisiono por libera Kubo‘, kiu antaŭvidis totalan ŝanĝon de la aferoj en Kubo ene de ses monatoj. Castro travivis dek usonajn prezidentojn, Obama estas la dekunua.

⁷ Vd. http://en.wikipedia.org/wiki/Cuban_democracy_movement.

leninisma platformo diversaj revoluciaj organizaĵoj estis kunigitaj, tiel ke en 1965 la Komunista Partio de Kubo (PCC) povis finfine naskiĝi. Ĝia unua sekretario fariĝis Fidel Castro. Povas esti ke por la iama etburĝa antikomunisto ne estis tro facile ŝanĝi la ideologian linion. Aliflanke li sentis sin libera interpreti la marksismon laŭ propra plaĉo kaj kaprico. La marksisma kompreno de Castro, kiu servis kiel ideologia preteksto, ne baziĝis je la dogmoj de la klasikaj marksismaj teoriistoj, sed estis influita de la specife kubaj cirkonstancoj, do por Castro la marksismo ne signifis sciencan sistemon, sed praktikan senton. Kompreneble, la ŝanĝoj en la ideologia koncepto kaŭzis malklaraĵojn kaj kontraŭdirojn en la politiko mem. Por nebuligi ilin Castro daŭre trovis kaj defendis novajn interpretojn de siaj motivoj kaj intencoj kaj tiel do ŝajnis logikan konsekvencon de la okazaĵoj, kiuj draste diferenciĝis de la imagita formo. La procezo devis esti eksplikita al grandparte tradicie ne- aŭ antikomunista publiko, kio estis alia defio, des pli ke en Kubo la konstitucia demokratio ne havis tradicion kaj ne pli profunde atingis la socion. La tradicia oficiala politiko reprezentis esence la intereson de la grandaj terposedantoj, de la grandaj entreprenistoj kaj de la meza urbtavolaro, kio entute koncernis eble unu trionon de la popolo. La prezidento, kiu estis rekte elektita de la popolo, respektis la interesojn de la kamparanaro: ekzemple pere de taŭga socia politiko Batista kolektis en sia unua mandatperiodo multajn voĉojn de la malblanka laboristaro. Do, malantaŭ la prezidenta registara sistemo, kiun Kubo posedis laŭ la usona modelo, nur malbone kaŝiĝis la figuro de la Kaŭdilo, reprezentata en la persono de Fidel Castro. Apud kaj ekster la rilatoj inter la popolo kaj la Gvidanto ekzistis kaj ĝis nun ekzistas nur malmultaj eblecoj esprimi la politikan volon kaj nur malfortaj ŝancoj efike influi la registaran politikon. Castro funkcias kiel recepta organo, kiu akceptas dezirojn kaj bezonojn de la ‚popolo‘, li mem estas la organo, kiu formas la politikan volon, kiu interpretas kaj artikuligas la bezonojn, li mem estas la aganto, kiu efektivigas la socian dinamikon kaj ankaŭ garantias ĝian vivtenadon kaj li estas tiu, kiu donas al la ‚amasoj‘ la okazon por apliki iliajn kontrol-funkciojn. La kontrolado de la registaro okazas pere de la aŭditorio, kiun la Gvidanto mem elektas kaj (retorike) preparas, ekzemple la 23an de julio 1970, kiam Castro proponis sur la Revolucia Placo sian (fikcian) demision al la amasoj. Nature, la amasoj ne deziras lian demision. Tiel funkcias la ‚rekta demokratio‘ de Kubo, kaj la raraj balotoj, kiuj okazas en tiu lando, estas nomataj, de Castro mem, „sistemo de konstanta partoprenado de la laboristaj amasoj en la formado de la partio“. Do, en Kubo la partio funkcias pli kiel kontrolorgano, kiu influas kaj koordinas la produktoprocezon, malpli kiel organo de la potenco, kaj ĝi estas nehavebla por la efektivigo de la ekonomia politiko de la registaro. Samtempe en Kubo ĉio ŝajne dependas de la Gvidanto persone kaj de la persono Fidel Castro mem kaj de la lojaleco al li. Ĉe Guevara vidis en tiu potencakumulo de la Gvidanto danĝeron por la revolucio kaj strebis bridi ĝin pere de ‚aro de mekanismoj‘, sed Castro sukcese defendis sin kontraŭ la limigo de sia persona influo. Lia kaŭdilismo estas preskaŭ perfekta, same lia arto kiel amasretorikulo, kiu kapablas hipnoti la amasojn, ŝanĝante diversajn rolojn, foje kiel akuzanto, defendanto, instruisto, batalanto, popoltribuno kaj profeto, kiu respektive reagis al la deziroj kaj bezonoj de sia publiko, tiel ke li mem konfesas, ke „kelkfoje oni ne scias, kiu parolas, ĉu oni mem parolas aŭ ĉu la popolo.“ En tio li komprenoble tute ne diferenciĝis de iu ajn faŝismo demagogo (ekzemple Mussolini). Ĉe Guevara tiel priskribis la fenomenon: Fidel kaj la amasoj komencas dialogon kun kreskanta intenseco ĝis ili atingas abruptan finalon, kies kulmino estas nia batal- kaj venkokrio. Sed kiel dirite jam en 1970 la populareco de Fidel Castro jam ne plu estis tiom forta kiel

antaŭe, kiam li estis kun Ĉe Guevara. Specifa por Kubo estas ankaŭ la cirkonstanco, ke en komparo kun aliaj eksaj aŭ daŭraj ‚socialismaj’ landoj, ne ekzistas malgranda subprema aparato, kiu staras super la amasoj, kiel en Sovetunio, GDR, Bulgario, Albanio aŭ Nordkoreio, kaj ankaŭ la Gvidanto ne disvastigas la klasikan hororon kiel tion faris Stalin, Ceaușescu aŭ Pinochet, Stroessner aŭ la politika reĝimo reprezentata de ili. Aliflanke la aŭtoritateco de Castro, kiu ĉiam denove alvokas entuziasmon, disciplinon kaj patoson, havas ion arteficialan, ĉar la tuta kuba (pseŭdo-)ideologio estas arteficiala. Evidente ĝi servas al la seninterrompa mobilizado de la amasoj kaj al ilia maksimuma politika kaj ekonomia utiligo (aŭ ekpluatado). Anstataŭ klasika subprema aparato kun ampleksa kaj bone organizita sekureca servo konata de totalismaj reĝimoj, en Kubo ekzistas sociaj strukturoj (kiel diversaj organizoj kaj komitatoj), en kiuj ĉiu kontrolas ĉiun kaj en kiuj ĉiu sentas sin kontrolata de ĉiu, do temas pri speco de ‚demokratia’ kontrolado aŭ ‚kontroldemokratio’. En tio nature ĉia kritiko kontraŭ la registaro fariĝas praktike granda problemo, ja apenaŭ ebla, kiel montras la ne malofta malaperigo, enprizonigo kaj likvido de ‚disidentoj’, kiuj fariĝis danĝeraj por Castro kaj ties regado. En emancipiĝinta moderna mondo tio estas eksmoda sistemo eĉ por Kubo, kiun la komputiloj kaj poŝtelefonoj intertempe ankaŭ atingis, dum en ĉiuj ĉirkaŭaj socioj la individuo kontrolas sin mem, eble eĉ en Venezuelo kaj Nikaragvo. Do, kvankam Fidel Castro ne estis la tipo de la klasika ideologo en la severa marksisma senco, eble eĉ ne la klasika diktatoro aŭ tirano, kiel oni riproĉis lin, li restis partikulara speco de (duon)dio, guroo aŭ papo por Kubo, kaj (duon)dioj, gurooj kaj papoj kiel konate ne eraras kaj ĉiam pravas. Pli gravaj ol rigidaj dogmoj estas por li la subjektivaj opinioj, granda estas lia respekto antaŭ kuraĝaj kaj aŭdacaj faroj aŭ de la decida entuziasma partopreno, inkluzive de Esperanto, kiel montris la unika kongresa jaro 1990, en kiu Castro nomis sin „soldato de Esperanto“ kaj demonstris grandan interesiĝon por tiu ĉi planlingva movado. La fortoj de la subjektivismo, voluntarismo kaj pragmatismo ja sufiĉis por inici la revolucion, sed ili evidentiĝis tro malfortaj por povi daŭre teni ĝin. Castro posedis tro malmulte da teoriaj kapabloj (aŭ interesoj) por liveri unu en si koheran ideologion; ĝuste tiu ĉi tasko estis transprenita de Ĉe Guevara, sed li devis, aŭ volis, cedi. Castro alproprigis ĝin, tradukis ĝin en la lingvon kaj pensadon de la simplaj homoj, faris el ĝi propran socialismon kaj (mis)uzis ĝin por siaj propraj regadointereso. La granda malavantaĝo de Fidel Castro konsistis en tio, ke li ne kapablis elteni kritikon kontraŭ lia politiko kaj kontraŭ lia persono, kio signifis, ke kritikantoj estis konsiderataj kiel perfiduloj kaj devis kalkuli pri gravaj sankcioj. En tio ĉi konsistis samtempe la senskrupuleco kaj brutaleco de Fidel Castro, kiu ĝis sia vivofino restas militisto, eĉ en la gimnastika vesto, kiun la maljuna sportisto portas en la hospitalo.

Fiaskinta kastrismo

Kubo suferis saman gravan problemon kiel la ceteraj socialismaj landoj. Ankaŭ Kubo estas perfekta ekzemplo por montri, ke malgraŭ ĉiaj entuziasmaj kaj entuziasmigaj sloganoj, la vivnivelo de la popolo daŭre falis – grandparte pro la kulpo de unusola persono kaj ties rigida menso, Fidel Castro. Jam komence de la 70aj jaroj daŭre mankis bazaj konsumvaroj, en la vendejoj oni povis aĉeti preskaŭ nenion sen rajtigaj kuponoj, sed aliflanke malmultekostaj aŭ senpagaj publikaj servoj estis je la dispozo, sed la kvalito de tiuj fariĝis pli kaj pli dubindaj. Pro tio en Kubo la homoj konsideras, ke

apenaŭ valoras la penon labori kontraŭ (aŭ por) mono. La ĝustajn, logikajn konsekvencojn el tiu mizero Castro neniam tiris; se oni jam abomenis la monon, oni povintus anstataŭe praktiki efikan stimulado de la laboro mem. Sed male, oni fantaziis pri „produkti novan homtipon kun nova tekniko“. Intertempe la tuta mondo, eĉ rusoj kaj ĉinoj, la protagonistoj de la ideo krei novtipan homon, ridas kaj mokas pri similaj sensencaj ideoj.

Por resti ĉe la fortaj flankoj de Castro: Sendube, Fidel Castro donis multon, sed nur al specifaj elektitaj tavoloj: Li donis egalecan socian konstitucion, precipe la socialan egaligon de la malblankuloj, certagradan altigon de la vivnivelo por la antaŭe senlaboraj kaj senposedaj kamparanoj (reguligita laboro, digna loĝejo), inkluzive de ilia alfabetigo kaj per tio la altigo de la ĝenerala kleriga nivelo kaj de la pli altnivela sansistemo. Krom tio, Castro donis al la kubanoj novan valorsenton, specon de misiosento por Latinameriko. Sed Castro fiaskis fakte jam sufiĉe frue kun la celo, kiun li proklamis post la transpreno de la povo: sanĝi la kuban socion kaj redoni al ĝi la kondiĉojn de libereco kaj juraj rajtoj. La kuba evolumodelo estis interesa en la 60aj jaroj ankaŭ por aliaj evolulandoj. Sed oni tro promesis kaj la ekonomio kabeis jam en 1969/1970, kiam la socia produkto de Kubo falis al la nivelo de 1958. Sur la ekonomia kampo Castro maltrafis la aliĝon al evoluoj, por kiuj en Kubo antaŭ Castro la ekonomia kaj infrastruktura bazo ekzistis. Post la epoko de la industriismo, incita de Ĉe Guevara, sekvis la periodo de la agrikulturismo, defendata de Castro.⁸ Anstataŭ purigi la propran domon, Kubo enmiksigis perarmee en diversaj konfliktoj, sendante soldatojn al fremdaj landoj en Ameriko kaj Afriko por apogi la komunistajn partiojn, en Nikaragvo, Angolo, Mosambiko kaj Etiopio. Parto de la kuba 'internaciisma' programo estis ankaŭ la dissendado de kuracistoj, fakte ĉirkaŭ 15'000, inter alie al Venezuelo, unu el la malmultaj amikoj de Kubo.

Malsaniĝo kaj malapero de Fidel Castro el la publikeco

Castro okupis samtempe la postenojn de la ŝtata prezidento, de la prezidanto de la ŝtata konsilantaro kaj de la estro de la ministraro, same li estis, en la rango de Comandante en Jefe, ĉefkomandanto de la kuba armeo, unu el la plej fortaj en Latinameriko. Kaj nelaste

⁸ Ĉe Guevara frue ekkonfliktis kun Castro kaj kun la komunistoj. Dum Castro restis pli pragmata, Ĉe Guevara komencis revii pri la idealoj de la ĉina komunismo, propagandis la planekonomion kaj pledis por la totala ŝtatigo de la kuba ekonomio. Sub la ekonomia 'gvido' la kuba ekonomio draste malboniĝis. Okaze de parolado kiel estro de la kuba UN-delegacio en Novjorko en 1964 Ĉe postulis la kopiadon de la kuba revolucio en aliaj landoj. Dum sia restado en Alĝerio en 1965 li kritikis Sovetunion, kio kondukis al la fortiĝo de la konflikto kun Moskvo kaj kun la kuba registaro mem. Revenante al Kubo, Ĉe pli kaj pli malaperis el la publika vivo, tiel ke li forlasis la landon en formo de kaŝita komercisto por daŭrigi la lukton en Kongo. Fine de 1965 li revenis al Kubo, sed jam la venontan jaron li iris al Bolivio por daŭrigi la revolucion kontraŭ la registaro, sed tiu batalo fiaskis. En oktobro 1967 Ĉe Guevara estis kaptita kaj mortigita, la 9an, sen antaŭa jura procezo, sed laŭ la ordono de la bolivia prezidento René Barrientos Ortuño far Mario Terán, serĝento de la bolivia armeo, kiu anoncis sin libervole por ekzekuti la ribelulon en la vilaĝo La Higuera (kie ekzistas monumento). La likvidon de Ĉe Guevara kunaranĝis la usona sekreta servo CIA. Ĉe estis metita sur katafalko kaj montrita al la gazetaro. Postmorte Ĉe estis mitigita kiel sanktulo kaj fariĝis internacia legendo. Precipe en Kubo Ĉe Guevara estas konsiderata kiel popola heroo. Post kiam oni malkovris la tombon de Ĉe Guevara en Bolivio, liaj restaĵoj estis transdonitaj al Kubo, kie en oktobro 1997 oni entombigis lin en la maŭzoleo en Santa Clara kun ĉiuj ŝtataj honoroj.

li estis la unua sekretario de la Komunisma Partio de Kubo. Ĉirkaŭ Castro estis konstruita senprecedenca personkulto, sed Castro mem rifuzis la aserton, ke ĉirkaŭ li ekzistas persona kulto.

La 20an de oktobro 2004 Castro falis okaze de publika manifestiĝo sur ŝtuparo kaj frakasis la maldekstran genuon kaj rompis la dekstran brakon. Multaj gazetoj sentis sin provokitaj publikigi la sensacion, ke Castro „falas“ en politika senco. Post grava malsano ĉe la intestoj, la 1an de aŭgusto 2006, Fidel Castro transdonis siajn funkciojn provizore al la pli juna frato Raúl (*1931). La 17an de decembro 2007 Fidel Castro anoncis perletere, ke li intencas retiri sin de ĉiuj siaj oficoj. Laŭ komuniko de la gazeto *Granma* li efektivigis tiujn intencojn la 19an de februaro 2008, kaj la 24an de februaro la parlamento elektis lian fraton Raúl⁹ kiel posteulon de Fidel en la ofico de la ŝtatestro. Ekde tiu tempo Fidel Castro estis tre malofte vidata aŭ aŭdata en la publikeco. Liaj regulaj „reflektoj“ (aŭ „meditadoj“) aperadas en la partia organo *Granma* kaj parte en interreto en diversaj lingvoj.¹⁰

Krom tio aperis preskaŭ 800-paĝa libro¹¹, kiu enhavas intervjuon, kiun la hispana inĝeniero kaj sociologo Ignacio Ramonet (*1943), iama direktoro (1991-2008) de *Le Monde diplomatique* kaj poste eldonisto de la hispana versio de tiu gazeto, krome honora prezidanto de Attac, faris kun Fidel Castro. En tiu intervjuo Fidel Castro ricevis larĝan spacon por prezenti siajn proprajn vidpunktojn, dum kritikaj demandoj al la iama ĉefrevoluciulo grandparte mankas. Anstataŭ kritika traktado de la verko de Castro, Fidel kaptis la okazon prezenti sin kiel „Opoziciulon numero unu“ kaj kiel modeste salajritan „Laboriston de la Revolucio“. La fakto, ke Ramonet, kiu cetere direktas abundajn laŭdojn al la adreso de la unua kubano, ne surbendigis la konversaciojn kun Castro, sed poste rekonstruis ilin laŭmemore kaj eĉ submetis la tekston al la intervjuo, por ke li povu kompletigi, redakti kaj plibonigi ĝin, ne faras la intervjuon aparte aŭtentika aŭ kredinda. Malgraŭ ĝia interpreta kaj instrua unuflankeco, la libro enhavas ankaŭ multajn interesajn historiajn detalojn rakontitajn el unua mano, pro kio la volumo vekos verŝajne ĉefe la atenton de historiistoj.

Parencoj de Fidel Castro kaj la estonteco de Kubo

La filo de Fidel Castro el la unua geedzeco kun Mirta Díaz-Balart, Fidel Castro Díaz-Balarto (*1949), nomata Fidelito, estas doktoriĝinta nuklea fizikisto ĉe la kuba Akademio de Sciencoj. Li kunlaboris en la fiaskinta kuba nuklea programo. El la dua geedzeco kun Dalia Soto de Valle estiĝis kvin filoj, kaj la rezulto de la sengeedza rilato kun Natalia (Naty) Revuelta estas la filino Alina Fernández Revuelta (*1956), kiu vivas en Usono kaj kiu estas konsiderata kiel unu el la plej akraj kritikantoj de la patro.

Hodiaŭ la situacio de Kubo ne estas pli bona, malgraŭ konsiderindaj enspezoj el turismo kaj malgraŭ la forfalo de la socialismo en la mondo. La lando estas politike kaj

⁹ Pro sia azieca ekstera aspekto, kiu komplete diferenciĝas de tiu de Fidel, la popolo moknomas lin „ĉineto“. Aperis eĉ duboj, ĉu Raúl entute estas la frato de Fidel.

¹⁰ Ekzemple: <http://www.cuba.cu/gobierno/discursos>, <http://www.embacubalebannon.com/fidel2010e.html> kaj <http://fidelcastroarchiv.blogspot.com>.

¹¹ Originala titolo: Fidel Castro. Biografía a dos voces. 2006.

ekonomie grandparte izolita. Kvindek jarojn post ilia revolucio la kubanoj, kiuj rigidiĝis en sia karibia insulbunkro, kiun ili ne rajtas forlasi kaj kiun la eksterlandaj turistoj nutras per dolaroj, mem devas pagi tre altan prezon por la fiaskinta eksperimento de la kastrismo, kiun la kubanoj subtenas ĝis nun. Sed la ekonomiaj ciferoj eble povus esti eĉ pli malbonaj. Se oni povas fidi tiun statistikon, laŭ la bruta enlanda produkto (BEP) po enloĝanto (2586 USD) resp. laŭ aĉetpoveco po enloĝanto (3784 USD), Kubo troviĝas ie meze de la internacia skalo antaŭ landoj kiel Dominikana Respubliko, Mjanmaro, Bosnio, Jordanio, Gvatemalo, Ĉinio, Indonezio, Irako, Hindio, Nikaragvo, Honduro, Bolivio, ktp., sed malantaŭ Peruo, Kolombio, Ekvadoro, Irano, Paragvajo, Gvatemalo, Ĵamaiko, Salvadoro, ktp. – temas plejparte pri fiaskintaj, obskuraj, paranojaj kaj danĝeraj ŝtatoj triamondaj sen perspektivo (krom kun la atombombo), kiuj kaŭzas nur kaprompadon al la mondonantoj, ĉefe nordamerikaj kaj eŭropaj, kiuj devas zorgi, ke tiuj ŝtatoj ne totale kolapsas kaj ne tiras aliajn ŝtatojn en la abismon.¹²

La ĉefa kaj esenca demando estas: Kio okazos post la *morto* de Fidel Castro ? Ĉu lia frato Raúl, la maljuna komunisto, kiu ĉiam staris en la ombro de Fidel kaj kiu ĝis nun ne postlasis aparte pozitivan impreson, savos, povos savi sian landon, aŭ ĉu tion devos fari aliaj, ekzemple, usonanoj kaj ekzilkubanoj ? Ĉu tiam okazos finfine la longge atendata ‚renversa’ revolucio ?

Cetere, la usona magazino *Forbes* taksis la monposedon de Fidel Castro je 900 milionoj da dolaroj, sed tio estas tre dubinda aserto. Castro mem replikis, ke li ne posedas bankkonton en eksterlando.

Spegulo

¹² Kubaj indikoj pri la bruta socia produkto mankas. BEP-komparo kun iuj eŭropaj landoj: Moldavio (603/1876 USD), Albanio (3021/5613 USD), Makedonio (3090/8660 USD), Slovenio (19510/23826 USD), Greklando (20754/23006 USD), Germanio (36646/31823 USD), Norvegio (61255/45023 USD), Luksemburgio (80040/68724 USD), Usono (48437/44966 USD).

Robert PONTNAU (FR)

Rumbo trista

Viditaĵoj en Kubo en la jaro 49 de la revolucio

(mallongigita Esperanto-eldono, surbaze de la franclingva originalo)

Alveno

Oni alvenas al Kubo tra la flughaveno José Martí. La internacia flughaveno, terminalo N°3 ne malsimilas la flughavenon de mezgranda eŭropa urbo. Grandaj vitraj aperturoj, gaje farbitaj metalaj pilonoj, sentaksaj vendejoj, jen kio unue okulfrapas. Poste oni staras en vicoj antaŭ la budoj de la polica kontrolo. Oni tiam eniras etan ejon, al kies plafono pendas spegulo, kiel mi jam vidis en la doganejo de la flughaveno en Belorusio. La policisto longe komparas vian vizaĝon kun la foto de la pasporto, memorigante orientan Germanion, kaj foje petas vin demeti la okulvitrojn. La pordo poste malfermiĝas al plia kontrolo: la metala detektilo, kio ja ne plu surprizas eŭropanojn, recente al kutimiĝintajn al severaj sekurecaj disponoj. Fine vi povas atendi vian bagaĝon, kiuj malrapide alvenas sen malfermiĝi post iks-radiado. Oni poste enlasos vin en la halon, kie familioj atendas parencojn kaj kie vojaĝagentejoj kaj ludonantoj venas preni siajn klientojn.

Unue vi ŝanĝos prefere viajn eŭrojn al unu el ambaŭ kubaj valutoj. Al konverteblaj pesoj (Cuc, Cubano Convertible), kies kurzo estas tiu de la dolaro, kiu estos la valuto de la turistoj, kaj eventuale al nekonverteblaj pesoj, kiuj estas la mono de la normalaj vendejoj. Ambaŭ valutoj estas interŝanĝeblaj eĉ por kubanoj. La konvertebla peso anstataŭas la dolaron, kiu estis la dua valuto de la insulo. Per Cuc oni pagas ĉiujn turistajn servojn, per Cuc la kubanoj aĉetas en valutaj vendejoj netroveblajn produktojn aliloke samkiel benzinon por la aŭtoj. La normala peso nomiĝas *'moneda nacional'* (nacia valuto), por aĉeti unu Cuc oni bezonas 25 pesojn en nacia valuto, kaj por unu Cuc oni donas al vi 24 naciajn pesojn aŭ en la flughaveno 80 centojn de eŭro en marto 2007.

Memkompreneble la flughaveno estas fora de la urbo. La internacia flugstacio male al ambaŭ naciaj ne disponas pri publikaj transportoj. Estas nur Cuc-taksioj, flavaj tutnovaj 'Peugeot 207' kun ofte flatemaj ŝoforoj, kiuj por tre okcidenteŭropa tarifo transportos vin al via celo en Havano.

Ekzistas kompreneble hierarkio de la transportiloj laŭ la uzantoj. Taksioj en nacia valuto estas la plej multaj. Tro kostaj por la kubanoj (10 naciaj pesoj) ili ne rajtas transporti turistojn, kio estas monpunebla. Oni ne trovas ilin en la turismaj zonoj, kie abundas Cuc-taksioj, kelkfoje malpli kostaj Lada-oj. Turistoj rajtas veturi per aŭtobuso (1 kuba peso) sed tio postulas antaŭajn konojn. Oni ne trovas planojn de buslinioj kaj sekve devas demandi pri la numero de la buso. Busoj maloftas kaj plenplenas kaj veturas sen horaro. Aparte timataj estas la 'camello'j (kameloj). Ŝarĝaŭto tiras ĝiban platformon granda kvazaŭ tri busoj kaj transportas ofte 500 homojn. Poŝtelistoj terurigas la veturantojn, oni sufokas en tiuj malbone aerumitaj busoj, kiam vintra temperaturo atingas +30°C. Do turisto forlasante sian hotelon veturos per Cuc-taksio, kies alta prezo pliriĝigos ĝian veran posedanton - la kuban ŝtaton.

Eniro en Havanon

El mia taksio veturante al Havano ĉio aspektas kvazaŭ en evoluinta lando: kvarŝpura vojo, fabrikoj kun farbitaj muroj tamen slogankovritaj, benzinstacioj ‘Oro Negro’ preskaŭ similas niajn...Ni poste atingos bulvarojn, kie flanke staras ombre de arboj sufiĉe freŝe farbitaj vilaoj. Poste Havano prenos vizaĝon de mia ĉiutaga vivo kiu daŭros pli ol du semajnojn: kadukaj kolonaj vilaoj el la komenco de la 20a jarcento. Fasadoj kadukiĝas, fendetiĝas eĉ foje disrompiĝas. Ŝtonoj falas de fasadoj sur ŝajne malflegatajn trotuarojn, foje tegmento disrompiĝis kaj staras nur ruinaj vandoj, la neloĝebla domo komdamne ŝlosiĝis, kaj tabuloj ŝlosas la pordon. La rubaĵkovritaj trotuaroj cetere ne estas en pli bona stato, betono nur loke plu troviĝas kaj oni devas atenti, kien la piedo iras. Ĉu la radio el Miami cetere ne parolas pri «ruina Havano», kio estas apenaŭ troigita en multaj kvartaloj? La pordoj, malfermitaj por spiti la vesperan varmecon lasas videti la intimecon de la loĝejoj. Sub gipsa fendiĝanta plafono: du lulseĝojn, senpordan vestaĵŝrankon, koloran televidileton por spekti la rozbonbonajn seriojn, kiuj tiom fascinas precipe virinojn, vivfinantan litovan fridujon, kiĉajn bildojn, kiuj pendas de pisflavaj vandoj. Sloganoj, precipe fronte de laborejoj estas, agrabla surprizo, sufiĉe maloftaj: kubaj flagoj, citaĵoj de Marti: «*Patrujo aŭ morto! Vivu Fidel!*» Kompletigita de «*Vivu Raúl!*» Finvenkistaj paroloj: «*Socialismo aŭ morto!*» aŭ la misaŭgura: «*Komandu komandanto!*», kiun mi tuj tradukas germanen al la misaŭguran «*Führer befehl!*».

La lando, izolita kaj ruinigita de la subita kolapso de sia aliancito, orienta Eŭropo, turnis sin sukcese antaŭ mallonga tempo al turismo. Miliono da turistoj en la jaro 2000, du milionoj en 2006, ĉio ĉi supozas ioman malfermiĝon, ne eblas vivi tiom da homoj en dudeko da selektitaj lokoj kiel siatempe faris Ĉinio de Mao kaj Albanio de Enver Hoĝa, ne tute sen sukceso, se oni kredas la atestojn de tiamaj verkistoj-vojaĝantoj.

Centro de Havano

Mi eliras el la kompreneble plenplena aŭtobuso ĉe la *Parque de la Fraternidad* apud la Kapitolo (*Capitolio*, kiu estas kopio de la Vaŝingtona Kapitolo. La ĉefaj stratoj estas renovigitaj. Tiu kvartalo estas tre turisma, kaj sekve ankaŭ la homa sinteno. De ĉie aŭdiĝas ĝisnaŭze «*berr ju kam from*». Kelkfoje, kiam la alparolanto ne ŝajnas al mi tro monavida, mi informas pri mia vera deveno kaj komencas mallongan konversacion ofte sufiĉe simpatian, foje disvolviĝantan al simpla almozpeto. Ĉu mi havas sapopecon? Moneron? Mi ja ne povas helpi dekunu milionojn da kubanoj, mi devas prioritare elekti. Fronte al la Kapitolo estas granda parkejo por Cuc-taksioj kaj privataj flavnumerigitaj aŭtoj. Entrepreno ludonas malnovajn aŭtojn kun ŝoforo. De malnova Ford el la 20aj jaroj ĝis la usona limuzino el la 50aj jaroj. Eŭforia turista grupo promeniĝas sin per roza sentegmenta raketvosta *Cadillac*. La kinejo *Payret* (duobla prezo: kubanoj 2 peso, eksterlandanoj 2 Cuc, facilalkula konverto!) ofertas festivalon de francaj filmoj. Mi min direktas al la maro tra la *Paseo del Prado*. Mi paŭzas en la *Parque Central*. Oni povas ripozi en ombro kaj eĉ trovi sidlokon sur benko. Jen aliflanke de la parko ariĝo de plurcentoj da plejparte nigraj homoj. Krioj, hurlado, minacantaj pugnoj. Ĉu manifestacias la kaŝita opozicio? Mi alproksimiĝas. Estas tutsimple vetperistoj, kiuj peras vetojn por bazopilko «*la pelota*», vira nacia pasio. Maldekstre de la *Parque Central* direktan al la maro, antaŭ la *Prado* estas pluraj luksaj hoteloj. Belegaj koloniaj konstruaĵoj de antaŭ la revolucio, bone renovigitaj, rezervitaj al eksterlandaj turistoj. Altegaj prezoj ekde 80 Cuc por unuopa ĉambro. Fakte

vojaĝagentejoj loĝigas tie siajn klientojn, kiuj pagos paŭŝalan prezon, multe pli avantaĝan.

Ni nun revenu al *Centro Habana*. Jen maldekstre la *Calle San Rafael*: luksaj, plej ofte Cuc-vendejoj, glaciaĵvendistoj, vestaĵvendejoj, Cuc-frizistoj, tubaraj vicpecoj, kaj kompreneble ŝakrantoj (*jineteros*). « Cigaroj ? Bonaj prezoj ! Ŝangi monon ? » Certe bonaj aferoj eblas sed oni devas koni la homojn. Mi cetere nenion bezonas kaj daŭrigas mian vojon al la *Prado*.

La *Prado* estas ombra promenvojo, kiu kondukas al la maro, kiel kutimas en la plej multaj latineŭropaj urboj. Ambaŭflanke belaj koloniaj domoj, ofte renovigitaj, malofte ruiniĝintaj kaj en flankaj stratoj hoteloj por eksterlandanoj. Mi iras al hotelo *Sevilla* por la plej kosta interretaliro en la mondo: 6 Cuc hore. En 20 minutoj oni apenaŭ povas malfermi sian leterkatolon kaj skribi unu aŭ du mallongajn mesaĝojn. Nur nigra Afriko ofertas pli malrapidan interreton. Kubo havas la plej malaltan porcenton de porteblaj telefonoj kaj komputiloj en tuta Suda Ameriko. Almenaŭ oficiale. Multaj kubanoj alportigas al si porteblan komputilon de siaj eksterlandaj parencoj. Aliro al la ekstera mondo ŝajnas stimuli deziron de kubanoj kaj timon de la ŝtataj instancoj, kiuj preparas 'intrareton', kiun ili povus kontroli. Ĉar telefono al Eŭropo estas ege kosta (5 Cuc minute), mi preferas sendi retmesaĝon kaj legi la respondon de tempo al tempo. Mia najbarino, simpatia argentinano, alparolas min por plendi pri la malrapida kaj kostega interreto kaj pri la altaj turismaj prezoj. « En Argentinio turismaj servoj estas multe malpli kostaj. » Ŝi opinias, ke Kubo estas polica ŝtato. La hotelhalo estas giganta kolona salono, konstruita antaŭ la revolucio ĉirkaŭ pluvkorto. Orkestro eterne ludas la samajn folklorajojn por la turistoj. Elirante mi ĉeestas alvenon de aŭtobuso kun francaj turistoj, kies banalaj eldiroj min konsternus, se mi ne kutimus ilin. Jen mi plu iras sur la Prado direkten al la maro. Elektronika vendejo, kie sudkoreaj hifiapartaroj kostas 350 ĝis 400 Cuc, do du jarojn kaj duonon de bona kuba salajro. Sapo, po 1 Cuc por peco, (kvartaga salajro), la « *libreta* » rajtigas nur je unu malmultekosta sapopeco ĉiun duan monaton. Mi donace kunportis sapopecojn, kun granda sukceso. Mi atingas la *Malecón* la marbordan vojon, kiun mi sekvas ĝis la hotelo *Deauville* preterlasante dekstre la kastelon *San Salvador de la Punta* kaj neglektante la viziton de la Muzeo de la revolucio, kies stalinisman reskribadon de la historio mi antaŭsentas, leginte multajn tiutemajn tekstojn. Mi iras laŭ la paralela strato *San Lazaro*. Kelkaj ŝakristoj, multaj « berr ju kam from », sed ankaŭ simplaj kaj simpatiaj homoj kaj multaj etaj picejoj en nacia valuto, kie oni povas modeste manĝi por 5 pesoj kaj trinki refreŝigaĵon (bedaŭrinde troege sukeran) kaj foje eĉ kafon. Vico antaŭ la *guarapera* (vendejo de senalkohola sukerkansuko). Fruktaĵ sukroj estas moderpezaj por kubanoj kaj bongustegaj sed tro sukeraj. En la strato, domoj en malbona stato, foje eĉ parte disfalintaj. Malmulte da trafiko. Malmultaj parkantaj aŭtoj.

Habana Vieja

Tiu kvartalo, la plej konata de turistoj troviĝas inter la havana golfeto kaj la stacidomo. Ĝi estas grandparte rekonstruita. Tie plej multas ĝenujoj, sed la multaj hoteloj kaj *paladar*-oj funkciigas turisman industrion, kiun la lando bezonas. La plej multaj nove rekonstruitaj stratoj donas la impreson de bonstata urbo. Preskaŭ ĉiuj prezoj estas en Cuc, kompreneble ne alireblaj al meza kubano. Jen la Katedralo kaj ĝia bela placo, ĵus rekonstruita: almozuloj, ĉifoj profesiaj, atendas turistojn. Folklore vestita cigarfumantino fotografigas sin por unu Cuc. La katedralo, konstruita en la 18a jarcento

de la jezuitoj, posedas belan barokan fasadon. Sur la placo inter Cuc-kafejoj preskaŭ samkostaj kiel en Eŭropo estas multaj laborejoj kaj eksponejoj de amatoraj pentristoj. Ĉiuj ĝenroj estas permesitaj kaj la naiva antila pentroarto tute ne estas la sola eksponata ĝenro, de figuriva al abstraktaj pentraĵoj ŝajnas, ke ĉi tie oni suferas nulan cenzuron. Mi tamen devas mallongigi la spektaklon, ĉar la pentristoj-vendistoj harpunas min sen lasi min pace kontempli iliajn bildojn. Laŭlonge de la *Castillo de la Real Fuerza* troviĝas turista bazaro. Skulptitaj ludiloj, sandaloj, T-ĉemizoj kun potreto de Che Guevara, kakiaj partizanaj kaskedoj kun ruĝa stelo, ĉio tio je kutimaj eŭropaj prezoj. Venas nun la *Plaza de Armas* konata pro siaj libro-brokantistoj. Multe da politika literaturo, nenombreblaj biografioj pri Che Guevara kaj Fidel Castro. Ankaŭ ĉi tie estas eŭropaj prezoj, eble eĉ pli altaj. Troviĝas tamen ankaŭ belaj antaŭrevoluciaj eldonoj sur bonkvalita papero kaj luksegaj kovriloj. Je mia granda surprizo mi vidas argentinan eldonon de la ekzilita kuba verkistino Zoe Valdes, *La nada cotidiana* (La ĉiutaga nenio) kun akre kontraŭkomunista tono. Mi demandas la brokantiston, ĉu ne estas danĝere eksponi tian libron. Ne, ne estas problemoj. Cetere la tre alta prezo protektas ilin de kubaj legemuloj. Jen la bela vendeja strato *Calle Obispo*, tute renovigita, kiu donas impreson de historia centro de hispana urbo. Ĝiaj vendejoj estas preskaŭ valutaj. Mi iras en apudan straton manĝi picon je kvarona prezo de ĉi tie, en nacia valuto. Multaj eksterlandaj turistoj fotografas kaj filmas senĉese kaj eniras en Cuc-restoraciojn (menuo: 14 Cuc !) La turistoj ne deziras malproksimiĝi de siaj hoteloj. Estas ankaŭ du Cuc-librovendejoj. La literatura elekto estas sufiĉe modesta. La kuba literaturo malmulte aperas escepte kelkajn klasikajn aŭtorojn kiel Nicolas Guillén kaj Alejo Carpentier, kelkajn poemarojn, sed estas malmultaj romanoj kaj noveloj dum oni trovas multajn sudamerikajn romanojn. Ĉu forta ideologia premo manifestiĝas sur la literaturo, esence kritika ? Mi trovas kvartalajn librovendejojn kun interesaj brokantaj libroj kaj prezoj alireblaj al kubanoj, kun multe da literaturo el centra kaj orienta Eŭropo, publikigita ĝis 1991. Ofte elstaraj titoloj. Foliumante tra malnovaj revuoj oni trovas unuajn verkojn de aŭtoroj, kiuj poste elmigris kaj ne plu eldoniĝas sur la insulo.

Nacia biblioteko

La nacia biblioteko José Martí rigardas al la placo de la Revolucio kaj indas viziton. Du giĉetoj ambaŭflanke de la enirejo, giĉetisto asertas, ke oni ne rajtas eniri sen leganta karto, kiu bezonas enskribiĝon, pasportajn bildojn kaj imposton ; la fronta giĉetisto asertas, ke oni povas viziti la ekspozicion lasinte siajn aĵojn en la vestejo. Du salonoj estas dediĉitaj al la granda kuba poeto *José Lezama Lima* (1910-1976). Unu ekspozicias la librojn de lia biblioteko, la dua fotokolekton. Sen nei la intereson de la ekspozicio, la katalogo interesas mi multe pli. Ĝi ne estas komputila. Mi rapide serĉas kelkajn ekzilaŭtorojn. *Pedro Juan Gutiérrez* aŭtoro de la fama « Malpura Havana trilogio » neeldonita en Kubo tute ne troviĝas. Male mi trovas « *Fuera del Juego* » (« Ekster la ludo ») de *Heberto Padilla*, lia laste aperigita verko en Kubo, kiu startigis atakojn de la partio kaj devigis lin elmigri. Tamen nenia lia posta verko troviĝas en la katalogo. Mi rapide vizitas la fotoekspozicion, ĉar mi konas nur la poeton, ĝi ne tre allogas min. Sed jen mi estas sola kun bibliotekistino, bela mulatino, ĉarma sub sia blanka bluzo kaj la jupeto de sia sablokolora uniforma kostumo, la vizaĝo tamen makulita de malflegata variolo. Ŝi venis el Santiago, oriente de la insulo antaŭ du jaroj kun sia fratino kaj sia eksedziniĝinta patrino. Ŝi trovis tiun laboron por 300 pesoj monate kaj serĉas pli bone pagatan. Ŝi pene elturniĝas, manĝante en la labora manĝejo tre modestan tagmanĝon.

Supon, paneton, teleron da splititaj pizoj kun kelkaj fiŝaj eretoj por nur unu peso. La vivo estas ankoraŭ pli malfacila oriente de Kubo. Por veni al Havano oni bezonas rekomendon de sia CDR, kio pravigas ortodoksan sintenon. Ne estas oleo oriente en libretaj vendejoj. Tiun informon mi jam legis en la disidenta gazetararo. Mi profitas ŝian fidon por fari kelkajn demandojn. Multaj homoj ne ŝatas la reĝimon, sed ili silentas pro timo de sankcioj, oni parolas nur, kiam certas, ke oni estas sola kun sia kunparolanto. *Radio Martí* (de Miami) ? Oni devas ĝin mallaŭte aŭskulti, vandoj estas maldikaj kaj *chivatos* (denuncistoj) multaj, puniĝas de monpunoj kaj eĉ de malliberejo. Normalaj kubanoj ne povas eliri el la insulo. Oni devas membri delegitaron aŭ esti turneanta artisto. Tiuj, kiuj havas parencojn eksterlande elturniĝas pli bone, ili povas aĉeti en la « *shopping*-oj » (Cuc-vendejoj). Kubaj virinoj ofte prenas amoranton por plibonigi la monatfinon. Ne eblas negeedziĝinte preni hotelan ĉambron kun kubanino, pli bone esti diskreta kun eksterlandano en turismaj kvartaloj pro la polico. Oni riskas restadmalpermeson en Havano, se oni rekulpas. (Resume, tio estas la ‘batalo kontraŭ prostitucio’, pro kiu la turisma literaturo gratulas la reĝimon.) Raúl ? Li estas pli malbona ol sia frato, li estas la armeestro kaj ne hezitos sendi la armeon kontraŭ manifestacio. Mi demandas ŝin, ĉu ŝi estas edziniĝinta. Ne, tio ne estas interesa, oni nur havas aldone dom- kaj infanzorgojn, la maĉistaj kubaj edzoj ofte batas sian edzinon spite la oficialan malpermeson. Kaj fine ŝi petas min alporti al ŝi ...sapopecon, kion mi faros.

Vedado

La nacivaluta taksio ne rimarkis, ke mi estas eksterlandano, mi lasas min konduki sen diri unu vorton, kiu povus perfidi min, ĉar oni tiam kredus, ke mi estas hispano. En *Habana Vieja* aŭ *Vedado* mi certe trovos *guagua*-n (aŭtobuson) inter ambaŭ. Ni atingas Vedadon, mian celon. La taksio haltas apud la glaciaĵkafejo *Coppelia* tuj apud la hotelo *Habana Libre* kaj la kinejo *Yara* (ĉi tie ankaŭ estas festivalo de francaj filmoj) kaj de la *Calle 23* kun multaj diskotekoj, luksaj restoracioj kaj *paladar*-oj (duonleĝaj valutaj restoracioj). La hotelo *Habana Libre* estas la plej konata en la urbo, unu el la plej grandaj kaj eble la plej kosta. Ĝi estas la eksa hotelo Hilton inaŭgurita en ĉeesto de la prezidanto Batista, kiu poste iĝis « tirano », far sinjoro Hilton mem. La nokta vivo viglas kaj la dancejoj aparte multas. La plej multaj hoteloj havas trinkejon-dancejon sur la teraso. Kvankam kelkaj kontrolas la legitimilon, nenio malpermesas konduki tien kubaninojn. Ĝenerale la muziko estas elstara, sed je mia surprizego oni ludas multajn kubajn klasikajojn kaj malmultajn kreitaĵojn. Ŝajnas ke la ora aĝo de la muzika kreado okazis en la kvindekaj jaroj, kies sukcesojn oni reuzas. Daŭrigante la *Calle 23* oni atingas la marbordan *Malecón* kun grandioza vidpunkto sur *Centro Habana*. Mi finfine ne preteriros la monumenton al *Calixto García*, ĉar oni ofte estas tedata: de ĉie venas « berr ju kam from ? » Biciklaj taksioj harpunas vin en baza angla kaj nur pene lasas vin trankvila. La domoj de tiu riĉa kvartalo estas ĝenerale en bona stato kaj parkas sufiĉe multaj aŭtoj. Meze de la nokto mi veturos per nacivaluta taksio al mia kvartalo *Vibora*. Chefeton ludanta policisto longe kontrolas la paperojn de la ŝoforo, post poŝlampa lumigado de la silentaj pasaĝeroj. Mi scias, ke mi povus kaŭzi problemojn al la ŝoforo, se oni ekscias, ke li transportas eksterlandanon, sed jen post kelkaj gestadoj (kaj diskreta trinkmono ?) la policisto malaperas kaj iras kontroli la aŭton de junaj bonhavaj kubanoj.

Lernejo

Who controls the past controls the future
Kiu kontrolas la pasintecon kontrolas la estontecon

G. Orwell 1984

Havana konatino kondukas min viziti sian lernejon. Ŝi tie instruas komputadon, kiu samtempe estas la revo kaj la inkubo de la kubaj ŝtataj instancoj.

Tio estas bone flegata unuagrada lernejo. En ĉiuj unuagradaj lernejoj la infanoj portas pioniran uniformon. La disciplino estus regalo por niaj instruistoj. Laŭ ordono de la instruistino la infanoj eksilentas kaj tuj sidiĝas. Ĉe la muroj portretoj de *Che Guevara*, *Camilo Cienfuegos* kaj foje *Fidel* akompanata de sia frato *Raúl*. Murgazeto rakontas la oficialan historion de la revolucio.

Mi eksciis de alia instruistino ke la instruado ne estas sen problemoj. Instruistoj preferas labori kiel servistoj en turistaj zonoj kaj forlasas la lernejan servon. Oni ofte uzas helpinstruistojn. Sed jen iu venas kaj la konversacio finiĝas.

La komputada salono konsistas el kvar oficaĵaj komputiloj kun angla klavaro, sufiĉe malnovaj. Ili ne havas interretaliron, sed oni povas legi dokumentojn kaj enmemorigi ilin. La direktoro de la lernejo, afabla instruisto, montras al mi elektronikajn fotojn pri Havano en la 40aj jaroj. Ili nomiĝas *Programa de obras del presidente Batista* (konstruadprogramo de la prezidento Batista). Foto de enmigrinta kvartalaĉo montras, ke tiam oni ne kaŝis la mizeron. Cetere oni efektivigis grandajn konstrulaborojn en la kvardekaj jaroj: konstruado de la marborda vojo *Malecón*, de la ĉefaj stratoj kaj de multegaj hoteloj, el kiuj la hotelo *Hilton*, en tempo kiam la 'tirano' Batista estis leĝe elektita kaj kiam lia registaro inkludis tri komunistajn ministrojn...

Mi povas laŭvole pligrandigi la fotojn por rigardi detalojn. La fasadoj estas bone flegataj, la aŭtotrafiko viglas, oni vidas multajn novajn usonajn aŭtojn. La montrofenestroj de la vendejoj estas abunde provizitaj per varoj, sen ebla komparo kun nun kaj oni ne vidas vicojn.

Tiuj fotoj konfirmas tion, kion montras la statistikoj kaj kion atenta observanto povas diveni: Kubo estis antaŭ la revolucio relative prospera lando. La nigra bildo pri la pasinteco estis kreata de la reĝimo por pravigi la nunon.

Bilanco de duonjarcento

La kuba revolucio eniris en sian kvardeknaŭan jaron. Kubo estas unu el la kvin lastaj komuniste regataj landoj. Ĝia revolucio, kiu tiom revigis la okcidentajn intelektulojn ankoraŭ plu estas sankta lando de multaj revoluciaj romantikuloj kun komunista kulturo. Multaj amikecasocioj donas pri la lando revan bildon. Hodiaŭ mi mem trovas simpatiantojn, kiuj ne volas fidi mian rakonton. Aliaj devenigas ĉion malbonan de la 'blokado' kiel gurdadas la reĝimo. De jam preskaŭ duonjarcento Fidel Castro kaj lia familio posedas pere de ununura partio la absolutan povon super tiu lando de 11 milionoj da homoj. Ne estas plurpartiaj balotoj, malestas esprimlibereco, ĉiuj amaskomunikiloj estas kontrolataj de la reĝimo. Malestas sendependaj sindikatoj. La loĝantaro estas enkadrigita de CDR, kiu denuncas kaj subpremas la opozicion. Neniu kuraĝas malfermite kritiki la reĝimon. La radio el Miami estas perturbita, estas danĝere aŭskulti ĝin. Oni nur kaŝe povas havi satelitan antenon. Kvankam tre malmultaj kubanoj povas permesi al si aĉeti komputilon, interreto pro sia malfermo al eksterlando kaj al la disidenteco kaŭzas zorgojn ĉe la ŝtataj instancoj kaj anatemoj de la gazetaro. La disidentaro tamen kreskas malgraŭ la subpremado kaj la pezaj malliberigaj punoj. Oni

oficiale nomas disidentojn perfiduloj kaj CIA-agentoj. Kubo estas la lasta unupartia reĝimo de latina Ameriko. Ŝajnas neeble nei, ke ĝi estas diktaturo. Oni povas supozi, ke tiu diktaturo estas kondiĉo al pli bona mondo. Ni juĝu do ĝiajn rezultojn kaj supozu, ke ĝi havas humanistan intencon.

La ekstera politiko kondukis la landon al izolo, el kiu Venezuelo de Ĉavez apenaŭ ŝajnas elirigi ĝin. La amasa helpo de la soveta landaro abrupte malaperis kun la landaro mem, postlasante katastrofan ekonomian situacion, kiun la amasa turismo nur parte plibonigis. La ruiniga politiko de apogo al la afrikaj marksismaj-leninismaj reĝimoj per alsendo de armeo fiaskis, ĉar neniu el tiuj reĝimoj postvivis. La usona 'blokado' ne malhelpas Kubon aĉeti nutraĵojn de Usono. Ĝi ankaŭ ne malhelpas eŭropajn turismajn investojn. Ĝi tamen permesas pravigi ĉiujn mankojn.

Kion povas opinii la kubanoj, kiam duonjarcenton post la revolucio sapopeco aŭ tualetpapero estas luksaĵo? Kiam la *libreta* sufiĉas por unusemajna provizo kaj kiam ĉiuj aliaj produktoj estas ege kostaj en normalaj vendejoj kaj nepageble kostegaj en la *shopping*-oj? Kiam la meza monata salajro ne superas sep eŭrojn? Kiam en Havano oni staras en vico tri kvaronhoron por veturi per plenplena aŭtobuso? Kiam nenio estas abunda kaj malmultekosta krom rizo, nigraj fazeoloj kaj kelkaj fruktoj?

Oni ofte aŭdas diri, ke estas socialaj atingiĝoj dank' al la reĝimo. Mi ne povas juĝi pri la instruado, kvankam mi konstatis pezan ideologion kaj dungadproblemojn. La dua sukceso estas laŭdire medicino. Ĉar oni kuracas eksterlandanojn en specialaj bonkvalitaj, pagendaj kaj kostaj malsanulejoj, ne eblas juĝi pri la normala medicino. Kubanoj asertas, ke ili havas bonajn kuracistojn sed ke kuraciloj mankas. Eĉ aspirino estas malfacile trovebla. Nur kuracistoj estas senpagaj por kubanoj, kiuj devas pagi la kuracilojn, kiam ili estas. Oni rajtas supozi, ke kuracistoj pene kuracas sen kuraciloj kaj ke iliaj malaltaj salajroj emigas al ŝmirmono.

Racio kompreneble ne povas kunvivi kun kredo. Ĝi tamen indikas al ni, ke la kuba reĝimo estas kompleta fiasko, sur ĉiuj kampoj: politika, ekonomia kaj sociala. Ne mankas dokumentoj, oni nur devas ilin ekzameni. Nuraj signoj pri espero: multiĝas opoziciuloj kaj kaŝitaj partioj (ne ĉiuj estas 'dekstraj', ekzistas eĉ du neleĝaj socialistaj partioj) kaj la alta aĝo de Fidel, kiu lasas videti ŝanĝojn.

Inter alie la revoj de okcidentaj intelektuloj permesis, ke la kuba diktaturo daŭradu. Al tiuj intelektuloj apartenas la devo helpi tiujn, kiuj malgraŭ subpremado batalas por plurpartia reĝimo. Eĉ en la plej malfavora kazo, plurpartia reĝimo pli respegulos la interesojn de la kubanoj ol la nuna totalismo. Al ni ĉiuj apartenas la tasko rapidigi ĝian finon.

Februaro-aprilo 2007

La kompleta franca originalo aperis en: Robert Pontnau, Rumba triste: choses vues à Cuba en l'an 49 de la Révolution. Temps modernes, ISSN 0040-3075, N° 649, 2008, p. 302-331.